ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
706.544-D
ESP



ÖNB
+Z13733740X

La nova vivo. x)

Estas dedičata al mia karulino-filino Helenjo.

I.

En malgranda fervoja budo loĝis fervojgardisto Ĵpato. Li estis altkreska brunulo kun varioldifektita vizaĝo, kvazaŭĝiba dorso kaj longa mallarĝa kaj maldensa barbo. Granda fornego „rusa" okupis preskaŭ trionon de lia malvasta modesta loĝejo, tablo kiuj du benkoj estis tuta ĝia mebluro; malgranda ikono de la Sankto en la angulo, du signallanternoj - ruĝa kaj verda -, kiuj du kunvolvitaj samkoloraj flagetoj signalaj, pendintaj sur la muro, ĝuste apud la pordo mem, kune kun malnova, tute rustiĝinta, paŝilo estis tuta ĝia ornamo. Du negrandaj fenestroj kun polvokovritaj vitroj rigardis nealtan sablan sursŭtaĵon, laŭlonge de kiu kuŝis paro da senfinaj reloj, kurintaj dekstren kaj maldekstren, vicon da telegrafaj metalfadenoj, kiuj tage kaj nokte, somere kaj vintre, enuige kriis malgaje kantis sian senfinan kaj nekomprenebl an kanton, kaj grandan, densan arbaron, kiu etendiĝis je multaj verstoj je ambaŭ flankoj de la fervojo. La arbaro estis ~~kruta~~ riĉa je sovaĝaj bestoj kaj diversa ĉasaĵo, somere ĝi abundis je fungoj kaj beroj. Sed neniu ĉasis je la bestoj, neniu kolektis la fruktojn de la arbaredo, ĉar la plej proksima vilaĝo kuŝis je dekdu verstoj post ĝi kaj Ĵpato mem ne havis familion kaj ŝatis pasigi liberan tempon senokupe. Dum aŭtunaj malluma j noktoj malsataj luparoj vagis sentime ĉirkaŭ la budo, serĉante nutraĵon kaj tiam ilin ne povis timigi eĉ preterkurantaj vagonaroj.

Ĉiutage en fiksitaj horoj la budon preterkuris kvar pasaĝeraj vagonaroj, du dekstren kaj du maldekstren, per kiuj Ĵpato mezuris tempon kaj kiuj por li anstataŭis horloĝon, kaj sen nombraj ŝarĝvagonaroj.

Antaŭ alproksimiĝo de ĉiu pasaĝera vagonaro Ĵpato devis eliradi el sia budo kaj, starante antaŭ ĝi, per la verda flageto tage kaj per la verda lanterno nokte, signali al maŝinistoj, ke tiu parto de la vojo, kiun li observis kaj gardis, estas sendanĝera. Nur por unu momento en tiaj okazoj antaŭ Ĵpato aperadis kaj malaperadis okazaj kaj ne pririgardeblaj vizaĝoj de maŝinistoj kaj pasaĝeroj, rigardintaj tra vagonfenestroj, kaj tuj post tio li ree restadis sola. Sed, krom tiuj ĉi okaze-vidataj homoj, Ĵpato ĉiutage dum penega esplorado de la reloj, renkontadis sensanĝe du siajn kolegojn - najbarojn, kiuj loĝis en tiaj samaj budoj, kia estis lia, je unu verstо dekstre kaj maldekstre; opte malrapide preterveturis la budon, kaj iafoje haltis kontraŭ ĝi, malgranda manmovata vagoneto de remontistoj kaj vojĉefoj, iafoje haltis apud la budo piedirintoj malriĉaj, ne havintaj monon por veturi en vagonaro, iafoje iu el ili eĉ pasigis nokton kun Ĵpato kaj iunufoje ĉiumonate li piediris al la plej proksima stacio, kuŝinta de li je ok-

x) Premiita de XIII Internacia Floraj Ludoj. (1927.) En Hispanujo. (La unua premio).

706544-D.Esp

OESTERR. NATIONAL BIBLIOTHEK WIEN

verstoj, por ricevi sian salajron kaj aĉeti nutraĵon. Cetere, dum lastaj jaroj, post kiam unu migrinta nekonatulo, al kiu li donis ripuĝejon por unu pluva aŭtuna nokto, ŝtelis de li kvinrublan papermonon, kuŝintan apud la ikono, kaj paron da feltŝuoj, Ĵpato jam plu al neniu permesis transpasi sojlon de sia budo kaj, se iu petegis lin pri la ripuĝejo persiste, sulkinte la brovojn superŝutis tian kuraĝulon per insultaĵoj kaj minacis per la pafilo.

Tiu kolego de Ĵpato, kiu loĝis malderkstre de li, - pli proksime al la stacio, Filip Vasiliĉ, estis belaspekta kaj ankoraŭ forta maljunulo. Tutan sian vivon li pasigis en ofico de fervojgardisto, ŝatis ĝin kaj neniam volis ŝanĝi ĝin je ia alia, pli bone pagata, kvankam lia estraro, inde taksinta lian fervoron kaj akuratecon, kelkfoje proponis al li oficlokojn ĉe la stacio mem, kie allogis multajn gardistojn, kiuj deris pasigradi sian vivon malproksime de loĝlokoj, meze de la arbaredo. Ĉiuj estimis kaj ŝatis la maljunulon, kiu estis severa, sed bonanima kaj helpema laboristo kaj familiĉefo. Li estis homo multeleginta, pia, li nek drinkis brandon kaj fumis tabakon, nek iam ellasis el la buŝo vantan aŭ insultan vorton. Kiam li estis en bona humoro, kion ajn li laborus, li nepre duonvoĉe kantis ian religian himnon, se lia humoro ne estis konforma al tio, li ion parolis mallaŭte, sin turnante al neniu, kaj, kvazaŭ riproĉe, balancis per sia griza kapo. Lia edzino ankaŭ estis bonanima, modesta kaj laborema maljunulino, kiu preterlasis neniun piedirintojn neprovizinte je io necesa: iun ŝi nutris, iun trinkigis per lakto, iun provizis je piedĉifonoj. La maljunuloj jam delonge vivis solaj, kvankam ofte dum somero gastis ĉe ili genepoj. Du filoj de ili - antaŭ longe edzigitaj - estis en ĉio similaj al la gepatroj kaj havis bonajn oficlokojn sur la sama fervojo kaj ilia sola filino, ofte vizitinta ilin, ĝuis feliĉan kaj riĉan vivon, estante edzino de komercisto, kiu posedis restoracion apud la stacio mem.

Filip Vasiliĉ havis grandan mastraĵon, kian havis neniu el fervojgardistoj kaj kiun envias ĉiu el ili. Fervojestraro donis al li senpage negrandan parcelon apud lia budo, kie li aranĝis legomĝardenon kaj abelujaron, en la stalo post la budo neniam staris malpli ol tri aŭ kvar bovinoj, antaŭ la fenestroj mem de la budo estis aranĝita senartifika, tamen bela florbedo, kiu agrable rigardis meze de la ruinitona, dezerta fervojo.

La alia kolego de Ĵpato Sidor Petrov, aŭ Sidor Kiŝkà (intesto), kiel kutime oni moknomis lin pro lia maldikeco, estis neordinare maldika, altkreska malsanema viro de mezaj jaroj. Pretekste de sia malsano - li ĉiam tusis konvulsie - li preferis resti senokupa kaj ĉiam oni povis vidi lin sidanta ie en ombro de la arbarrando sur deklivo de sabla fervojsurŝutaĵo sen laboro kun cigaredo en la dentoj, aŭ kuŝanta ebria, se li havis okaze brandon. Li opiniis sia devo nur ĉiutage fari promenon laŭlonge de la vojo por supraĵe esplori la relojn, ĉion alian plenumis lia edzino kaj infanoj. Kiŝkà havis malbonan, atakaĉeman karakteron kaj, kiam li estis ebria, sen indulge batis la edzinon kaj infanojn sen ia kaŭzo. La familio de Kiŝkà estis granda, sed

čiuj inĝanoj, krom la plej maljuna filo-dekjara Fedĉjo-malforta kaj timema, tamen bona kaj vigla knabo, estis ankoraŭ malgrandaj. En la ludo de Kiŝká estis ĉiam malpure kaj molriĉe.

Ĵpato enprofundaĵo de sia animo estimis Filip'on Vasilič kaj sentis moralan superecon de li, kvankam ĉiam eritis daŭran kunestadon kun li. La maljunulo ofte aludis al li lian sencelan vegetadon, esprimis miron, kiel li povas kontentiĝi je sia soleca kaj senokupa vivo plaŭla kaj neutilo je ripročis lin je trouzado de abomenindaj insultaĵoj, kiujn Ĵpato uzis ĉiam en sia parolo, tute ne rimarkante tion kaj kvazaŭ opiniante tion necesaĵo kaj neanstataŭeblan klarigaĵo, sen kiu lia parolo perdus sian ĝustecon kaj precizecon, - unuvorte, la insultaĵoj ludis por li la saman rolon, kiun ludas artikolo en kelkaj lingvoj. Ofte, kuŝante dum longaj senokupaj horoj sur la varma fornego kaj aŭskultante malgajsonan zumadon trudeman de la apudvoja telegrafo, Ĵpato rememoris la maljunulon, konsciis pravecon de liaj ripročoj, kaj dum tiaj minutoj ŝajnis al li, ke la telegrafzumado rokas lin al ia nova, pli bona vivo. Kaj stranga afero: kvankam li mem ne povis klare prezenti al si, kia devis esti tiu ĉi nova vivo, tamen li kun kelka bedaŭro sentis, ke iam, eble, post nelonge li devos tute aliĝi la nunan. Li neniam revis edziĝi, opiniis edziĝintojn plej malfeliĉaj homoj en la mondo kaj je nenia trezoro ŝangus sian fraŭlan vivon je tiu de edziĝinto. Ankaŭ li ne povis elekti alian oficon, ĉar li ne estis kapabla al ia metio aŭ al terkulturado. Do, kia povus esti la nova vivo? Kio povus devigi lin ŝanĝi la nunan vivon, kio povus enporti en ĝin novarangon? Sed tiuj ĉi kaj aliaj similaj demandoj ĉiam restis nesolvitaj de Ĵpato, kiu dum tiaj minutoj longe turniĝis sur sia malmola kuŝejo de unu flanko sur la alian, gratis sian vilan kapon kaj laŭte sopiris, antaŭe ol forta dormo sukcesis forpeli la trudemajn kaj nesolveblajn malgajajn pensojn.

Kiŝká'on - la alian kolegon - Ĵpato opiniis sia amiko kaj tio ĉi estis ne pro ia merito aŭ supereco de tiu, kontraŭe, en sia animo li malestimis tiun ĉi maldiligentulon, diboĉemulon, sed li estis sola homo, kun kiu Ĵpato povis babili sincere pri io ajn, ne timante ian mokon, aŭ ripročon. Krom tio Kiŝká ĉiam volonte sendis sian filon - Fedĉjon por anstataŭi Ĵpaton en dejorado ĉe lia ludo, kiam li devis foriri al la stacio por riceri salajron, aŭ ien aliloken je siaj afezoj. Ofte, trovinte brandon, la amikoj drinkis ĝin kune kaj en vigla babilado malaŭdis siajn estrojn kaj mokis je pieco kaj graveco de Filip Vasilič, kion ili neniam kuraĝis dum lia ĉeesto. Dum tiaj minutoj Ĵpato nepre aludis al la amiko pri sia maltrankvila atendado de io nova en la vivo kaj Kiŝká ĉiam senŝanĝe, elaŭskultinte lian jam delonge konatan al li rakonton, responde malaprobe-nee skuis sian kapon, kraĉis kaj, tra sia kutima konvulsia tusado, parolis:

— Mi aŭdis, mi aŭdis tion ĉi, najbaro... Kio ankoraŭ mankas al vi?.. Ho, mi scias tiun ĉi vian novan vivon!.. Jen, vi mortaĉos, tiam... Antaŭe mi mortaĉos, poste - ankaŭ vi!..

ber

neg

ber

ma

ma

zu

lu

na

roj

tay

ka

la

ria

ale

ta

ki

ju

mo

ke

on

ilu

sil

čio

ilu

m

ev

II.

Estis mezo de Marto. Kvankam en la aero jam estis sentata proksima veno de prin-
tempo, kvankam tage la suno staris pli supre sur la ĉielo, tamen noktoj ankoraŭ estis frostaj kaj
neĝo diktavole kuŝis en la arbaro, kiel antaŭe. Nur la budo kaj la fervoja surŝutaĵo, antaŭ longe li-
beriĝintaj de neĝo, nun gaje nigriĝis meze de la blanka mortkovrilo de la ankoraŭ dormanta natur
Ĵpato, ellitiĝinta pli frue ol ordinare kaj jam havinta tempon por hejti la fornegon kaj maten-
manĝi, delonge jam sidis sur benko antaŭ la budo, atendante baldaŭ-preterkurontan pasaĝ-
ervagonaron. Estis trefrua kaj frosta mateno kaj tombeja silento regis ĉirkaŭe. Nur sopirĝemis
malgaje la telegrafo kaj mallaŭte-obtuze tra la reloj kuris bruo de la ankoraŭ nevidebla vagon-
aro. Sed Ĵpato aŭdis nek tion, nek la alian. Lia vizaĝo estis pensoplene-gaja, nekutima rideto
ludis sur ĝi kaj senmova rigardo estis fiksita malproksimen, renkonten al la atendata vago-
naro. La bruado de la reloj ĉiam fariĝis pli kaj pli aŭdebla, jen ekbrilis malproksime ruĝaj faj
roj de lokomotivo, jen jam estas vidataj en densaj buloj de nigra fumo helaj fajreroj, estingiĝan-
taj dum sia flugado, jen ekstremis la tero.

Ĵpato saltleviĝis de la benko, rektiĝis, etendis antaŭen la dekstran manon kun signalflageto
kaj krazaŭ rigidiĝis en tiu ĉi senmova pozo. La vagonaro, kiel freneza, jam delonge preterkuris
la budon kaj Ĵpaton, sed li longe ankoraŭ senmove staris sur la loko kun la mano etendita kaj gaje
ridetis jen io. Poste li sidiĝis kaj, malpacience sulkante la frunton, ekrigardis dekstren, krazaŭ
atendante iun.

Antaŭtage Ĵpato, kutime esplorante la relvojon, renkontiĝis kun Filip Vasiliĉ, kiu estis okupi-
ta je la sama laboro. La najbaroj afable interŝanĝis salutojn kaj sidiĝis ripozi sur kruta deklivo,
kiu ĝuste limtuŝis konfiditajn al ili partojn de la fervojo. Ili ambaŭ estis en bona humoro. La mal
junulo kiel ĉiam estis neparolema, tamen li bonanime ridetis, aŭskultante Ĵpaton, kiu, kuti-
me spicante sian parolon per alomenaj insultvortoj, arde priparolis urĝan necesecon ŝanĝi
kelkajn reltrabojn proksime de la loko, mallaŭdis indiferentecon de estroj, kiuj ĝis nun ne ord-
onis ankoraŭ alveturigi novajn trabojn kaj tuŝis aliajn demandojn, kiuj senpere koncernis
ilian opicon.

— Sinjoroj inĝenieroj estas homoj instruitaj, - graztone, tamen mole, komencis Filip Va-
siliĉ post longa paŭzo, ĝena por ili ambaŭ, sekvinta longan babiladon de Ĵpato. — Ili scias
ĉion ne malpli bone, ol ni ... jes!... La trabojn nur iom eniĝis en la sablon, ni iam kune levetu
ilin iom kaj metu sub ilin ŝtonetojn, jes...

La maljunulo subite silentiĝis, ekspiris plenbruste, ordigis sur la kapo ĉapon kaj, trans-
metante el la dekstra mano pezan martelon, kiun li tenis enĝi, en la maldekstran, kun
evidenta intenco etendi ĝin adiaŭe al la kolego, jam ekvantis mallaŭte ian himnon. Ĵpato

tuj komprenis la intencon de la maljunulo kaj ankaŭ jam sin preparis por leviĝi, kiam sur la fingroj de la maldekstra mano de la kunulo li subite eksvidis mallarĝajn blankajn bandaĝojn, kiujn li ne rimarkis antaŭe. Tio ĉi eksinteresis Ĵpaton kaj li, kun flata rideto sur la lipoj, ekskuis per la kapo kaj diris, montrante per la rigardo la bandaĝojn:

— Kaj vi, Filip Vasiliĉ, ne formanĝu vin rano, videble, ĉiam laboras ion hejme? Ĉu vi konstruas novajn abelujojn?.. Jen la mano estas difektita...

— Mi konstruas... — respondis la maljunulo, ne tuj interrompante la himnon. — Sed ne abelujon mi konstruas, mia amiko, mi havasilin supiĉe, sed sturnodometojn...

— Ĉu sturnodometojn?.. — eksvidis surprizita Ĵpato kaj aldonis al la vortoj plej abomenan insultaĵon.

La maljunulo por unu momento sulkis la frunton pro la insultaĵo, kvazaŭ pro ia malbonodoro eksentita, sed baldaŭ ree tra lia sulkoplena vizaĝo disverŝiĝis milda, infana rideto.

— Jes, sturnodometojn!.. Sed mi jam pariĝis maljuna, mia kara, la okuloj nun ne vidas tiel bone, kiel antaŭe, nu, mi difektis la manon, — li diris, supren levante la bandaĝitan manon kaj rigardante ĝin. — Ŝi baldaŭ resaniĝos, tio ĉi ne estas grava! — kaj post nelonga paŭzo li daŭrigis ĉiam kun kreskanta entuziasmo: — Baldaŭ ja venos printempo, alflugos el-post maro niaj plumharaj gastoj... nu, ili loĝu ankaŭ apud mia budo. Mi delonge revis konstrui tutan vilaĝon por sturnoj, sed ĉiam mankis lignotabuloj konvenaj... Antaŭ du tagoj mi alportis de la stacio tutan amason da malnovaj kestoj kaj jam aranĝis pli ol dudek sturnodometojn. Jen ĝojos sturnoj!.. Min ofte vizitas la genepoj, ke ili ankaŭ gaju, observante la birdojn!.. Ankaŭ mi kun la edzino iafoje rigardos tra fenestroj ilian klopodadon senlacan... zorgojn pri koritaro... kaj nevole ni rememoros nian junecon, nian pasintaĵon, kiam en la budo ni havis ankaŭ malgrandajn idetojn... Nu, rigardante la birdojn, ni iom forgesos nian nunan izolecon, nian nunan maljunecon... — finis la maljunulo.

— Jes!.. — diris Ĵpato kaj dauŭra malfacila ekspiro elfluigis el lia brusto.

— La vivo estas mallonga kaj ni eĉ ne rimarkos, kiel ĝi venos al sia fino... Kaj estos tre maldolĉe, tre malgaje konscii mortante, se ni dum la vivo faris nenion... nek al ni mem, nek al aliaj... se dum la vivo ni estis nur kvazaŭ parazitoj, nur „fumaĵis la ĉielon", kiel oni parolas en popola proverbo...

„Nu, la maljunulo ree aludas mian vivon", — ekpensis Ĵpato, rimarkinte la subitan retiriĝon de la parolo de la komenca temo. — „Kial li senĉese maltrankviligas min per similaj aludoj? Antaŭ nelonge li komparis min kun ŝtipo, putranta en arbaro, hodiaŭ... Kaj Ĵpato jam intencis protesti, per unu fojo pudentigi la maljunulon, ke li plu ne kuraĝu mokaludi lin, sed Filip Vasiliĉ kun neordinara vigleco leviĝis, amike etendis al li la manon kaj ekrigardis lin tiel

apable, tiel bone, ke tiu ĉi rigardo tuj tuŝetis la koron mem. Kaj maldelikataj, ofendaj vortoj, kiuj jam estis pretaj forflugi de la lango de Ĵpato, tute neatendite restis ne diritaj.

— Nu, adiaŭ, karulo!... – diris la maljunulo. – Mi babilis kun vi pli longe, ol decis. Mia budo estas malproksime kaj la piedoj estas maljunaj... Nu, adiaŭ, estu sana!..

— Estu sana ankaŭ vi!... – nevole, kun granda konfuzo respondis Ĵpato, premante lian manon.

— Pardonu, eble, mi, pro mia malsaĝeco, diris ion ofendan... – daŭrigis Filip Vasiliĉ, retenante la fortan, vejnecan manon de Ĵpato en sia malmola, kaloplena mano. – Ĉu vi iros morgaŭ la stacion por ricevi salajron? Ne preteriru mian budon, mia edzino regalos vin per teo kun mielo... Adiaŭ!..

Kaj la maljunulo, ekkantinte himnon, ekpaŝis rapideme laŭlonge de la relvojo nek levante la kapon malleviten, nek returnante ĝin al Ĵpato, kiu longe staris senmove sur la loko kaj ne deturnis de li sian pensoplenan rigardon.

— Tamen li estas bona maljunulo... vereme... kaj ridinda!... – laŭte parolis Ĵpato al si mem, grandpaŝe revenante hejmen. – Li konstruas sturnodometojn... kiel infano... strangulo!.. Tutan vilaĝon por sturnoj li volas aranĝi!.. Jen, oni ridos, jen oni...

Kaj nevole, subite aperis en imago de Ĵpato la bela budo de Filip Vasiliĉ, simila nek al tiu de Ĵpato, nek de Kiška. En la malgranda ĝardeneto floras flordetoj, abeloj zumas ĉirkaŭ siaj diverskoloraj dometoj, ludas infanoj – la genepoj de la maljunulo kaj ĉie, kien ajn ekrigardus Ĵpato, altestaras sur stangoj novaj belaj sturnodometoj. Kaj kortuŝiĝis nevole Ĵpato, ĵus li prezentis al si tiun ĉi bildon, kaj longe li amadmiris ĝin, kvazaŭ ĝi estis antaŭ liaj okuloj.

— Bone!... Kian bonan ideon havas la maljunulo, ke diablo lin... Sed kial ia simila ideo neniam venis en mian kapon?.. – li daŭrigis, ĉiam laŭte parolante. – Mi loĝas sola... mi ĝuste kuŝas, kiel ŝtipo putranta, kiel trafe diris la maljunulo!... kaj estas nenia utilo al iu de mi, mi nur „fumaĵas la ĉielon", jes, vere, „mi fumaĵas" ĝin!... kaj poste mi mortaĉos... Kaj neniu priploros min, neniu bedaŭros... neniu rememoros min per bona vorto...

Kaj doloriga, trančanta malĝojo, antaŭe tute nekonata al li, sento de soleco, forlasiteco subite atakis lin kaj spasme kuntiris lian gorĝon kaj, neniam plorinta dum la vivo, Ĵpato eksploris.

Preskaŭ la tutan nokton, turniĝante de unu flanko sur la alian, Ĵpato ne povis endormi. Je tedemaj sonoj de la metalpadeno li ĉiam pensis pri la maljunulo – najbaro kaj revis pri nova vivo, kiun li decidis komenci tuj de la tagiĝo mem. Sed, kiel antaŭe, li ne povis klare prezenti ĝin al si, ne povis diri, je kio ĝi diferencos de la ĝisnuna, tamen ĉiam neklare vidiĝis antaŭ li sturnodometoj, sturnoj.

— Morgaŭ mi nepre aĉetos najletojn, petos de Martin-komercisto malnorajn kestojn kaj... kaj ankoraŭ mi serĉos ie apud la stacio ian hundaĉon... Kiam mi mortaĉos, almenaŭ ĝi ĝemlojos pri mi... – laŭte diris al si Ĵpato, ekspirinte kun plifaciliĝo, kaj dolĉe ekdormetis je bruado de ia preteririnta ŝarĝvagonaro. – Ĵi morgaŭ...

III.

Post duonhoro de malpacienca atendado Ĵpato, fine, ekvidis malproksime du homajn figurojn, kiuj rapidemе paŝis al li laŭlonge de la sursŭtaĵo, ili estis Kiŝkà kun la filo. Laŭmezure de ilia alproksimiĝado malpacienco de Ĵpato kreskis, ĉiam ŝajnis al li, ke lia amiko-prosia maldiligenteco-iras tro malrapide, ke ili venos al la stacio tro malfrue kaj li ne havos sufiĉan tempon por plenumi ĉion ekprojektitan antaŭtage. Formetinte de la kapo ĉapon, Ĵpato longe svingis per ĝi en la aero kaj kriis kun laŭtaj insultaĵoj, instigante per tio la piedirintojn, ke ili iru pli rapide.

— Kia malpaciencа vi estas hodiaŭ... – diris Kiŝká, fine, alproksimiĝinte al Ĵpato kaj etendante al li sian manon. Li longe konvulsie tusis, de lia frunto fluis gutoj de ŝvito. – Mi kuris, kiel hundo, kiel rapidvagonaro... mi ankaŭ soifas ekdrinki branđon en la restoracio apud-stacia, eble, ne malpli, ol vi... Nu, bonan matenon!..

La amikoj interŝanĝis kutiman sekan manpremon. Dum Kiŝká faris cigaredon el ĉifita peco de gazetpapero, Ĵpato jam donis necesajn instrukciojn al Feđjo kaj provizis lin por la tago je modesta nutraĵo.

— Ni iru, ni fumos dum la vojo, – rapidigis Ĵpato la amikon, puŝante lin je la mano.

— Kien, memaĝere, vi tiel rapidas? Estas ja frua horo ankoraŭ... Ni longe estos devigitaj atendi salajroviceron en la stacidomo, ja la kontoristoj dormas longe... – koleris Kiŝká, mirante je la nekomprenebla malpaciencо de Ĵpato. – Atendu unu sekundon, mi nur ekfumos.

Sed Ĵpato nek aŭskultis, nek plu atendis Kiŝka-on, li tuj ekiris grandpaŝe al la celo. Kiŝka kuratingis lin, insultis, admonis, ke Ĵpato iru pli malrapide, ke senĉesa tusado malhelpas al lia rapida irado. Sed nun la ĉeesto de Kiŝká ĝenis Ĵpaton, distris liajn pensojn kaj malhelpis al lia revado. Ne iom atentante la admonojn, petojn kaj insultaĵojn de la kunulo, li paŝis ĉiam pli rapide. Komence Kiŝka penis ne postresti de Ĵpato, li, spasme spirante, tusetante, saltkuris post la amiko, sed tio ĉi baldaŭ tedis al li kaj, iom post iom postrestante, fine, li malrapidigis sian paŝadon.

Survoje Ĵpato eniris en la budon de Filip Vasilič. La maljunulo forestis, lia edzino klopodis apud hejtiĝinta fornego. Ekvidinte la gaston, ŝi afable petis Ĵpaton sidiĝi kaj metis antaŭ li teleron da blankaj fus frititaj kuketoj. Kvankam Ĵpato estis malsata, kvankam li preskaŭ neni-

am prandis je tia alloga manĝaĵo, li senhezite ripuziĝis kaj, dankinte la bonulinon, informiĝis pri la mastro.

— Li ion laboras post la budo, - respondis la maljunulino, kun miro rigardante la nekutime-pensoplenan vizaĝon de Ĵpato. - Se vi tiel urĝe bezonas je li, mi tuj venigos lin, li ankoraŭ ne matenmanĝis, - ŝi daŭrigis, višante siajn manojn kaj sin direktante al la pordo.

Sed Ĵpato baris al ŝi la vojon kaj petis, ke ŝi ne maltrankviligu pro li la edzon. Poste, dankinte la mastrinon por la afableco, li adiaŭis kaj eliris. Post la budo apud plektobarilo de legomĝardeno Ĵpato ekvidis la maljunulon. Kliniĝinte super improvizita rabotstablo, Filip Vasiliĉ duonvoĉe kantis ian religian himnon, ne rapidante kaj peneme rabotante ian tabulon. Lia blanka tola antaŭtuko kaj grize-blankaj haroj, malsuprenfalintaj super liaj okulvitroj el-sub ĉapo, disbloviĝis de vento, rabotaĵoj gaje šutiĝis ĉirkaŭe. De unua rigardo estis evidente, ke la maljunulo estis en bona humoro, ke en la laboro li trovis plezuron.

Ĵpato da tempo staris senmove, silente observante la maljunulon kaj ne kuraĝante interrompi lian koncentriĝitan laboron. Nur kiam li finis la rabotadon kaj, esplorinte de ĉiuj flankoj la tabulon, metis ĝin al la plektobarilo ne ĉesigante la kantadon, Ĵpato malkuraĝe alproksimiĝis al li.

— Helpu Dio, Filip Vasiliĉ !..- li diris, - vi jam ion laboras...

La maljunulo malrapide, trankvile turnis la kapon al Ĵpato, ekrigardis lin per siaj bonaj, ridetantaj okuloj kaj, daŭrigante sian kantadon, etendis al li la manon. Poste li prenis en la manojn segilon kaj, trasegante novan lignotabulon, ekkantis kortuŝe, senteme:

— „... Kiu, krom vi, defendos en malfeliĉoj ? Ekaŭdu mian ĝemploron kaj kliniu vian orelon al mia petego, Potenculino, Patrino de mia Dio..."

Ĵpato staris sur la sama loko, observante ĉiun movon de la maljunulo kaj atente aŭskultante la nekonatajn por li vortojn de la preĝo, kiuj nevole penetris tuj ĝis lia koro mem. Li volonte starus tiel longe kaj aŭskultus, sed li sentis ankaŭ necesON rapidi.

— Ĉu vi, Filip Vasiliĉ, iros hodiaŭ por ricevi salajron ? - demandis Ĵpato, ĵus la maljunulo formetis la segilon kaj ree prenis la rabotilon. — Mi atendos vin... ni iru kune...

— Ne, mi ne iros, karulo, mi ne iros... - tiu respondis jam ne ĉesigante la laboron, - anstataŭ mi ricevos ĝin mia filino... Iru kun Dio, ne atendu min...

„... Kaj ne malŝatu min pekan, kiu serĉas vian helpon kaj defendon... kaj ne forigu min -pekulon..."

Filip Vasiliĉ levis la kapon kaj ekrigardis Ĵpaton, kvazaŭ dezirante sciiĝi, ĉu li foriris, sed tiu staris ankoraŭ senmove, aŭskultante la sanktajn vortojn.

— Baldaŭ, mia kara, alŝlugos la gastoj - sturnoj kaj por ili mi ne preparis eĉ duonon da dom-

etoj!.. Mi neiros... mi ne havas tempon! – li diris ree, kvazaŭ dezirante pli baldaŭ liberiĝi de la gasto kaj daŭrigis la kantadon kun kreskanta, kiel ŝajnis al Ĵpato, entuziasmo:

...„Prudentigu kaj instruu min, Reĝino de la Ĉielo! Ne foriru de mi – via sklavo pro mia plendado... Estu mia patrino protektantino!.."

Ĵpato, kiel antaŭe, staris hezitante: li volis ankoraŭ demandi pri io Filip-on Vasiliĉ, aŭ, almenaŭ, aŭskulti ĝis fino la himnon, sed li ne kuraĝis. Malrapide turniĝante reen, li jam volis diri al la maljunulo adiaŭsaluton, kiam subite li ekvidis ion, kio tuj haltigis lin kaj igis lian koron inten se ekbati: malantaŭe de li apud la muro mem de la budo staris tuta vico da novaj ĵus-konstru-itaj sturnodometoj. Ili estis penege faritaj el glate-rabotitaj lignotabuletoj kaj ornamitaj per belege aranĝitaj etaj peronetoj. Ĵpato ankoraŭ neniam vidis ion similan. Sentante ravon pro la surprizo kaj tuj forgesinte ĉion, li prenis unu sturnodometon en la manojn kaj, skuante la kapon pro admiro, longe trarigardis ĝin de ĉiuj flankoj.

— Nu, vi estas elpensema, ke... (tie sekvis longa kaj sagaca plej malkonvena insultaĵo), kiajn bonegajn dometojn vi konstruas!.. En ili devas loĝi ne ordinaraj, simplaj sturnoj, sed plej noblaj...

Filip Vasiliĉ, ekaŭdinte la insultaĵon, tuj forlasis la laboron, interrompis la himnon kaj, sulkinte la vizaĝon, riproĉe ekrigardis la kolegon.

— Ĵli estas bonaj, mi scias tion, – li diris post nelonge per laŭta kaj gravtona voĉo, – sed, mia kuzo, ili ŝajnus al vi eĉ pli belaj, se vi ne parolus insultvortojn. Mi jam ne unufoje konsilis al vi, ke vi ĵetu vian abomenindan kutimon... animpereigan... Ĉu vi neniam rimarkis, karulo, eĉ bestoj forturniĝas, kiam ili aŭdas...

— Pardonu, Filip Vasiliĉ!.. Je tio... Ĉu vi ne kredas: iafoje mi mem ne dezirus diri insultaĵon, sed ĝi mem nevole forglitas de la lango... Kion fari, se mi havas tian kutimon... mi alkutimiĝis...

— Tio ĉi neniom aliĝas la aferon, – daŭrigis la maljunulo jam per pli mola voĉo, – neniom senkulpigas vin, ja homo povas alkutimiĝi al kia ajn abomenaĵo... Oni alkutimiĝas drinki, ŝteli... ĉu...

— Vi parolas veron... Ĵuste tiel... – balbutis Ĵpato, kun konfuzo mallevante la kapon kaj poste starigante la sturnodometon al la muro. – Sed se vi scius, Filip Vasiliĉ... post via hieraŭa parolo mi ne dormis la tutan nokton, mi ĉiam...

Kaj en longa detala parolo Ĵpato sincere rakontis al la maljunulo ĉion, kion li trasentis dum la nokto. Li ankaŭ ne kaŝis de li sian revon pri la „nova viro" kaj sian firman decidon jam hodiaŭ komenci ĝin, t.e. akiri ie apud la stacidomo ian hundidon kaj aranĝi ankaŭ apud siaj budo sturnodometojn.

Interplektinte la brakojn sur la brusto, la maljunulo atente aŭskultis Ĵpaton kaj eĉ unu fojon

Rudarstvo

Rudarstvo

Kraljevina

Rudarstvo

ne interrompis lian konfeson. Jen aprobe balancante per la kapo, jen ridetante tra la okulvitroj, li fikse rigardis sian najbaron kaj lia vizaĝo fariĝis ĉiam pli serena kaj profundaj sulkoj de lia vizaĝo ĉiam, ŝajnis, pli kaj pli glatiĝis.

La maljunulo promesis al Ĵpato laŭportan helpon en liaj bonaj intencoj, admonis, ke li estu firma en sia decido plu nek drinki, nek paroli insultvortojn kaj petis, ke li nepre haltu ĉe li dum revено kaj prenu de sturnodometojn kaj tabulojn, kiujn li donace donos al Ĵpato.

La edzino de Filip Vasilič kelkfoje ekkuris el la budo pozvoki la edzon al matenmanĝo. Ŝi estis mirigita de tiom longa konversacio de la viroj kaj ne povis kontentigi sian scivolecon – pri kio ili parolis tiom longe kaj tiom serioze.

Kun plifaciligita animo kaj ĝojo, lumiĝinta sur la vizaĝo, Ĵpato daŭrigis grandpaŝe la vojon. Proksime de la stacio ĉe vojkurbiĝo li atingis Kiŝká-on. Tie estis surprizita, konstatinte, ke Ĵpato, kiu postrestigis lin postsi, nun iris malantaŭe.

— Kie vi estis tiom da tempo?.. Kien vin portis diabloj?.. Mi jam suspozis, ke vi estas en la restoracio... – li diris, jus Ĵpato atingis lin. Kaj post nelonge, kvazaŭ konjektinte ĉion, li aldonis kun sarkasma rideto: — Ĉu vi estis ĉe la hipokritulo?.. Jen, kien vi tiel rapidis... Ke diablo prenu vin ambaŭ piulačojn!.. Kian amikon li trovis ankoraŭ... – sed li ne povis plu daŭrigi la senkaŭzan, ofendan parolon pro terura paroksismo de tusado.

Ĵpato nenion respondis, li eĉ ne aŭdis la vortojn turnitajn al li.

IV.

Kiŝká estis prava, kiam li parolis, ke oni devos longe atendi ricevon de salajro. Ĉu efektive la kontoristoj alkutimiĝis elĉitiĝi malfrue, ĉu okazis io alia, – tamen je tiu či fojo fervojservantoj ricevis sian monon nur tagmeze.

Ordinare dum atendado tempo pasas, kiel intence, turmente-malrapide kaj unu horo iafoje kvazaŭ daŭras pli longe ol unu tago. Fervojservantoj, amasiĝinte apud pordo de la stacikontoro, brue interparolis kaj fumis senĉese pipon post pipo. Jen tie, jen aliloke nesilentiĝante aŭdiĝis rido kaj insultaĵoj. Sed inter la atendantoj Ĵpato forestis. Sciiĝinte, ke oni ankoraŭ longe ne donos la salajron, li iris en vilaĝon, kuŝintan najbare de la stacio, esperante trovi ie „kunlogĝanton", kiel li jam nomis akirotan hundon.

Longe kaj senlace Ĵpato iris de unu domo de la vilaĝo al la alia, serĉante ian hundon, demandis ĉiun renkontiton, – ĉiuj serĉoj estis neprosperaj: hundo nenie estis, aŭ neniu volis doni al li sian hundon; kiel intence, eĉ en la strato je tiu či fojo estis nenia senhejma hundaĉo, kiuj antaŭe ofte vagis apud la stacidomo, serĉante ian manĝaĵon.

Ricevinte la monon, li kun kolegoj iris en la restoracion, sed, malgraŭ granda ten-

to kaj al ne malpli granda miro de la kolegoj, Ĵpato kontentiĝis je sola teo kaj eĉ ne eksplaris bradon, kiu abunde versiĝis ĉirkaŭ li.

Ĉetinte novajn plandojn por siaj botoj, salon kaj iom da blanka pasruno por venonta Pasko, Ĵpato malgaje jam revenis al la stacidomo por reveni hejmen, sed survoje li rememoris pri konstruotaj sturnodometoj kaj pri najletoj, kiujn li forgesis aĉeti.

En butiko de maljuna Martin, inter multaj amasiĝintaj nekonatuloj, Ĵpato renkontis du konatajn servantojn de la stacidomo. Ili ambaŭ estis, evidente, iom ebriaj, ĉar ili sendis ĉese ridis kaj estis neordinare gajaj.

— Ha, Ĵpato Savić... ke vi vivu ankoraŭ xvindekj jarojn kaj kvindek jarojn rampu kvarpiede!.. — laŭte eksklamis unu el ili, barante vojon al Ĵpato kaj amike frapante lin je la ŝultro.— Kion vi forgesis ankoraŭ, amiko?..

— Jen, — malgaje respondis Ĵpato, montrante siajn aĉetaĵojn, — mi ĉion aĉetis kaj tute forgesis pri najletoj... malgrandaj najletoj...

— Ĉu vi bezonas najletojn? — ridante demandis lin la alia konatulo. — Ĉu oni plu ne provizas vin je najlegoj por almajli relojn?.. Ĉu vi volas uzi nun tiacele najletojn?..

— Kiajn relojn!.. — eksklamis ankaŭ Ĵpato, dezirante iamaniere eble, plej baldaŭ liberiĝi de la trudemuloj. — Ĉu vi komprenas: mi volas konstrui sturnodometojn, ja alproksimiĝas printempo...

— Ĉu sturnodometojn?..

— Ĉu vi prenezigis kun ano Filip?.. Tiu ankaŭ, oni parolas, tage kaj nokte konstruas sturnodometojn kaj jam aranĝis tutan sturnovilaĝon... Ĉu vi intencas komerci kun li je sturnoj?.. Ja sturnoj ne estas anasoj...

Ĵpato jam bedaŭris, ke li pro sia simplanimeco elbabilis sian intencon, sed estis malfrue kaj ŝercaĵoj de la amikoj ŝutiĝis sur lin sen interrompe.

Laca, malgaja, premegata de la malprospera serĉado kaj ofendaj mokŝercaĵoj, Ĵpato eniris por unue momento en salonon de la stacidomo kun sekreta espero trovi tie ian hundaĉon.

Ĵus forveturis pasaĝera vagonaro kaj la salono estis malplena, senbrua. Staciestro rapideme estis donanta iajn ordonojn al sia helpanto, juna telegrafisto, kvazaŭ iom serĉante, marŝis malrapide tra la salono, rigardante tra fenestroj, kaj maljuna servisto balais la plankon, — plu estis tie neniu. Ĵpato, vidante tie nenian hundon, jam volis foriri kaj rapidi hejmen, kiam la servisto, kliniĝinte apud unu benko, subite ĵetis sian balailon kaj laŭte eksklamis pro miro. Preskaŭ samtempe el-sub la benko elsaltis maldika, mizera hundaĉo kun

ĉentaŭzi

nobéldevera

aŭ: de nobla familio

fjovokcibs

nobel devenon

kun subpremita rosto kaj ekaŭdiĝis laŭta plorvoĉo de sučinjano. Ĵpato ankoraŭ ne havis tempon por konsideri ĉion okazintan, kiam li envidis en la manoj de la servisto novan korbon el kiu iris la plorkrioj.

Post unu momento la servistoN jam ĉirkaŭis kun scivoleco ĉiujn ĉeestintojn. Baldaŭ aperis de ie per vojaĝendarmo, edzino de la staciestro, iaj virinoj. Ĉiuj, ne cedante unu al la alia, laŭte eldiris siajn supozojn, konjektojn pri la infano kaj ĝia patrino. Ĵpato komence observis ĉion de malproksime, sed poste ankaŭ li trapuŝiĝis tra la amaso kaj malpacience atendis, kio okazos plu.

Oni metis la korbon sur benkon, formetis de ĝi belan ratan kovrileton kaj elprenis etan estaĵeton, binditan je elegantaj rindotukoj, el kiuj elstariĝis nur blanketa nazeto kaj lipetoj. La infaneto silentiĝis. Trarigardinte la infanon, oni jam volis ree meti ĝin en la korbon, kiam iu rimarkis en la korbo kovrilon nefermitan. La ĝendarmo elprenis el ĝi leterpaperon kaj laŭte tralegis:

„La knabino. Ŝi estas dusemajnaĝa, baptita, nomita Angelina. Bonaj homoj ne riproĉu akcepti ŝin kaj eduki. La knabino estas nobldevena. La malfeliĉa patrino..." (Plu neniu estis legebla).

— Oni devus pendigi tiajn patrinojn!.. — la ĝendarmo interrompis silenton. — Ŝi porscias skribi kortuŝajn leterojn, sed ŝian idon volu eduki „bonaj homoj"!.. H-h-hundino!..

— Ĉu oni povas tiel, Ivan Ivanič?.. — la servisto sin turnis al li serioztone. — Ne forgesu, ke la knabinaĉo estas „nobldevena"... Vi vidis nenion, sed mi proprokude vidis, ke ŝi kuŝis tie sub la benko kune kun fava hundaĉo!..

La servisto, kontenta je sia spritaĵo, ekridis, la ĝendarmo ankaŭ ekridetis.

— La infano ne estas kulpa... Por kio moki?.. — riproĉe diris la virino.

— Sendube io devigis la patrinon ĵeti sian idon... Eble, ŝi nun prenezigis pro sia ago senkora... sed kion fari? — aldonis alia virino.

— Nu, kion vi faros nun, Ivan Ivanič? — demandis la staciestro.

— Kion ni faros?.. Ĥe-ĥe-ĥe!.. Kun la plej proksima pasaĝera vagonaro — kun N15-a ni sendu, via moŝto, la nobldevenulinon kune kun ŝia korbo kaj rindotukoj, aldonante policaxton subskribotan de ni, ke ni trovis ŝin sub la benko en la pasaĝersalono de la stacidomo... Ni sendu ĉion tion ĉi en la urbon, tie estas speciala domo por tiaj nobldevenulinoj... Ĥe-ĥe-ĥe!..

— Tie oni mortigos ŝin... Tie infanoj mortas ĉiutage, kiel muŝoj! — ekkriis la unua virino.

La ĝendarmo severe ekrigardis ŝin kaj, iom pripensinte, diris:

— Eble, vi volas akcepti ŝin, se vi estas tia kompatema, ni...

tedas
aŭ: eksedis

ajon
ne: afero

ĝuste just Rian mi traleĝis

... kaj

ion post ion diris

kuiranto

— Vi poras trovi iun pli riĉan ol mi...

— Eble, vi, ria moŝto, — la ĝendarmo sin turnis al la staciestro, — konsentos akcepti kaj eduki ŝin kune kun...

— Ĉu vi frenezuĝis? — la staciestro ekkriis timeme kaj eksvingis nee per la kapo kaj manoj. — Al mi sufiĉe tedis miaj propraj infanoj! Mia edzino... Preskaŭ ĉiujare ŝi sendas al ni jen knabon, jen knabinon... Ne!... Tio ĉi jam tedis... Sardu nin ŝi!..

— Mi bedaŭras... — diris la ĝendarmo. — Vi parus bonan aferon kaj liberigus min de multaj klopodoj. Eble, iu el vi, gesinjoroj, akceptos la infanon? — li aldonis pli laŭte kaj gravvoĉe kaj ĉirkaŭrigardis demande la amasiĝintajn scivolulojn.

Sed ĉiuj nur nee skuis siajn kapojn kaj ĝemspiris.

— Ĉu neniu?.. Sed mi esperis... Kion do ni faros?.. La afero ja estas serioza, komplikita... Nu, prenu ŝin iu! — diris la ĝendarmo kaj, fine, konvinkiĝinte, ke neniu havas ian deziron fariĝi edukisto de la malfeliĉulino, sidiĝis al tablo, elprenis paperon kaj inkon kaj komencis skribi:

„La 13-an de Marto 19..."

— Ne foriru, ne foriru, gesinjoroj! — li ekkriis subite, rimarkinte, ke la scivoluloj intencas foriri. — Antaŭe vi subskribu la akton kaj tiam...

— Ria moŝto, ria moŝto... — malkuraĝe komencis ĵpato per voĉo tremanta, ĵus la ĝendarmo rekomencis la skribadon.

Jam antaŭ longe, ĵus oni tralegis la leteron, trovitan en la korbo, ĵpato ekscentis treegan kompaton al la malfeliĉa knabino kaj nevenkeblan deziron akcepti ŝin, sed timante eblajn mokojn de la ĝendarmo kaj la staciestro, kiujn li nur malofte vidadis kaj kiujn li opinias „grandaj sinjoroj", kaj ne kredante, ke neniu volos akcepti la beletan knabinon, kiu tre plaĉis al li de unua rigardo, li silentis kaj per nenia movo aŭ ekspiro elmontris sian deziron. Sed laŭmezure de tio, kiel oni unu post la alia, rifuzis la proponon de la ĝendarmo, kreskis en li, komence plej malgranda espero, ke oni fordonos al li la knabinon. La espero estis tiom alloga kaj ĝojigâ, ke unu penso pri tio, ke li, eble, posedos la knabinon, igis lian koron bati ĝoje en la brusto, tamen ne malpli granda estis ankaŭ timo, ke jen iu ŝangos subite sian decidon kaj ekdezir os preni ŝin, aŭ subite venos en la salonon ankoraŭ iu, sciiĝos pri la trovitaĵo, envidos la belan vizaĝeton knabinan kaj forportos ŝin al si. Sed pasis momento post momento, la sento de timo cedis iom post iom sian lokon al sento de espero: neniu el la ĉeestintoj konkuris, neniu novaeniris. Emociita, forgesinta ĉion en la mondo kaj koncentriginta tutan sian atenton, ĉiujn pensojn sole je la knabino, senvoĉe kuŝinta, kiel antaŭe, en la korbo sur la benko, — ĵpato, ĵus la ĝendarmo sidiĝis kaj komencis skribi, aliris kun decideco al la tablo.

Eeestarita.

— Via moŝto, sinjoro ĝendarmo... mi... ĉu ripovas?.. — li rekomencis decidoplene, tamen anhoraŭ malkuraĝe.

— Ĉu ri?.. — la ĝendarmo levis la kapon kaj kun miro severe ekrigardis Ĵpaton.

— Jes, via...

Kun ĉiu turnis sian rigardon al Ĵpato, kvazaŭ ili tute ne vidis lin antaŭe.

— Sed vi estas fraŭlo? — diris la staciestro. — Kiu do vartos, nutros la infanon?..

— Via moŝto, mi... Dio vidas, mi... — tuta lia korpo tremis, la genuoj fleksiĝis.

— Antaŭe vi pripensu la aferon: oni devos uzi multe da klopodoj kaj zorgoj por kreskigi infanon... sen virino, sen la patrino... — aldonis gravtone la ĝendarmo.

— Mi ĉion pripensis, via moŝto... Mi eterne dankos vin... Mi ne dormos nokton, ne manĝos... zorgante... Jen, Dio vidas, via moŝto...

La ĝendarmo intersanĝis okulsignojn kun la staciestro, ekrigardis silente la emocian figuron de peteganta Ĵpato, poste mirigitajn vizaĝojn de la ĉeestintoj. Dum unu minuto daŭris turmentiga tombeja silento. Ĵpato interrompis ĝin. Genuiĝante antaŭ la ĝendarmo, li ekkriis kortuŝe:

— Ĉu devas perei la animeto baptita?.. Via moŝto, mi gardos ŝin, mi ĉion... — li volis diri multan kaj eloxvente, sed vortoj konvenaj ne venis sur la langon.

— Ĉu doni al li? — diris la ĝendarmo.

— Donu... — respondis la staciestro kaj ekspiringis per la mano.

— Via moŝto!... — ekkriis ĝojege Ĵpato, rapide leviĝante kaj reegenuiĝante antaŭ la staciestro. — Mi neniam forgesos vian bonecon... mi ĉiam pregos... — plorspasmoj kuntiris lian gorĝon.

— Nu... posedu la trezoron!... — fine, diris la ĝendarmo. — Prenu ĝin, sed ne rapidu, vi subskribos la akton... Tamen, ĉu skribi?.. — kaj li dissiris la paperon.

Ĵpato preskaŭ freneziĝis pro la ĝojo. Per unu salto li flugrapide alsaltis al la korbo kaj ĉirkaŭprenis ĝin per la manoj tremantaj, kvazaŭ ankoraŭ timante, ke iu forprenos ĝin de li, larmoj pluis tra liaj vangoj.

La virinoj, nun amasiĝintaj ĉirkaŭ li, ion flustris inter si, ion parolis al li, donis al li iajn konsiloj n. Kaj li, kliniĝinte super la korbo, ne deturnis sian rigardon de la beleta dormanta viza ĝeto, singardeme karesis per sia maldelikata, malmola mano la knabinon je la kovrilo kaj flustris ion ~~neaŭdeble~~ (neaŭdeble), sed feliĉe kaj kortuŝe.

Pasis nur kelkaj minutoj, sed pri Ĵpato-fraŭlo, akceptinta la forlasitan knabinon, jam disvastiĝis famo tra la tuta vilaĝo apudstacia. En la salonon nun senĉese eniris novaj kaj novaj vizitantoj por vidi la knabinon kaj la strangulon-servoj gardiston. Multaj, kortuŝitaj de la afero,

Spertaj-kertaj

flueate

kiun elmontris ĵpato al la fremda infano, ĝojis je lia felico, multaj ŝovis silente en liajn manojn kunrolvaĵojn da tolaĵo, tukpecojn, blankajn bulkojn. Ĵa virino donacis grandan molan, tute novan ŝalon kaj la edzino de la staciestro alportis iom uzitan kaŭĉukan suĉpipon, kiun ĵpato tuj metis en la buŝon de la infano.

V.

Estis jam densa krepusko, kiam ĵpato, akompanata de lastaj konsiloj kaj kondeziroj de la virinoj, eliris el la staciodomo. Apud ĝi kaj laŭlonge de la vojo gaje brilis signallampetoj, blovis akra malvarma vento kaj grandaj, facilaj kiel lanugeroj, negeroj rondflugis en la aero, nevolante tuj fali sur la tero kaj malaperi en grandaj negamasoj, kunmiksiĝinte tie kun sennombraj kaj jam plu nedistingeblaj siaj similuloj. La apudvoja telegrafo kutime kantis siansenfinan, trudeman kaj nekompreneblan kanton ennuan. Kaj stranga afero, ĝi jam ne ŝajnis nuntia al ĵpato. Metinte la ĉapon sur la frunton mem kaj zorge alpremante al sia brusto la portaĵon li paŝis rapideme ne deturnante sian rigardon de la korbo kun la infano dorminta kaj senĉese zorgatakite ordigante sur ĝi la kovriloj n. Sed kutimaj manoj de la kompatemaj virinoj bone konis ĝin kaj al la infano nun estis danĝeraj nek frosto, nek la vento. La vizaĝo de ĵpato estis ruĝa, ekscitita kaj en la barbo, sur kiu ne sekiĝis ankoraŭ abundaj ŝvitgutoj, brilis perlaglacietoj. Li delikate ridetis, liaj lipoj senvorte flustris ion kaj sur tuta lia vizaĝo estis disverŝita nesurtera felico.

Kvankam estis jam malfrua horo, kiam ĵpato atingis la budon de Filip Vasilic, ĝiaj logantoj ankoraŭ ne dormis kaj du helaj mallarĝaj strioj de lumo penetris el ĝiaj negrandaj fenestroj kaj, dispelante cirkaŭan mallumon, falis laŭlarĝe de la relvojo. Sur la tablo bruis samovaro kaj apud la tablo la mastro, sin arminte per grandaj malnovaj okulvitroj en nigriĝinta vitroingo, klinigĝinte kaj tute profundiĝinte en sian laboron, kortuŝe kaj mallaŭte kantante ian himnon kaj gaje frapetante per marteleto, ion konstruis. Apud li sur la planko kaj sur benkoj kuŝis rabotaĵoj kaj restaĵoj de blankaj, glate rabotitaj tabuletoj. La malĵunulo estis tiel profundiĝinta en la laboron, ke nek bruo de la pordo malfermata, nek la apero de ĵpato estis rimarkitaj de li. Nur kiam ĵpato singardeme metis la korbon apud varma forno kaj, formetinte la ĉapon, faris relkfoje krucosignon antaŭ ikono, kiam el lia brusto elflugis laŭta plifaciliga ekspiro, la mastro levis la kapon kaj kun miro ekrigardis la gaston.

— Ha, vi jam revenis, - li diris levigante kaj visante ŝriton, fluintan tra lia vizaĝo, - kaj mi ankoraŭ ne finis la promesitan... Jen, du sturnodometojn mi tute preparis por vi, - li montris la benkon, kie staris bele ornamitaj per figurĉizaĵoj kaj kolorigitaj sturnodometoj, - kaj tiu ĉi estas

preta post duonhoro... Sidiĝu, Savič, estu gasto! Ĝustokaze mi ankoraŭ ne trinkis teon, la maljunulino melkas la bovinojn, - li daŭrigis, fikse rigardante la feličan vizaĝon de la veninto kaj kun kaŝata ĉagreno jam suspektante, ke li ree ebriiĝis, ricevinte salajron.

Ĵpato silente sidiĝis, sekrete rigardetante sun rideto sian korbon.

— Nu, rakontu ion, - daŭrigis la mastro, sidiĝante apud Ĵpato, - kial vi silentas?.. Ĉu ĝojas, ke vi revenas gaja, sed ĉu vi ~~plen~~ plenumis vian promeson?..

Ĵpato ekridetis kaj ne povis diri ion pro la feliĉo, kiu tiel neatendite falis sur lian kapon.

— Ĉu vi trovis hundon?.. Nu, diru ion!.. Kiookazis al vi? La tutan tagon mi konstruis por vi la sturnodometojn, kaj vi eĉ ne ekrigardis ilin... — malkontentroĉe daŭrigis la mastro mirante je la gasto kaj ne povante diveni lian sekreton.

— Vi supozas, ke mi drinkis... Je Dio, kiel mi promesis al vi, mi neniam eĉ rigardos tiun ĉi abomenindan trinkaĵon!.. Ah, Filip Vasilič, estas tiel feliča, tiel feliča!.. Dio ekaŭdis mian preĝon...

La maljunulo levis la okulvitrojn sur la frunton kaj, pli proksime alnoviĝinte al Ĵpato, kun scivoleco fikse rigardis lin per siaj maljunaj ~~el~~ ct' aj okuloj, neniel povante kompreni, kia ŝanĝo okazis al la najbaro. „Ĵajne, li estas malsobria, - li pensis. - Sed neniam mi vidis lin tia ĝoja, feliča... Kia stranga li estas: li sidas, silentas kaj senĉese ridetas".

— Jen, vi, Filip Vasiliĉ, konstruas sturnodometojn, poste vi atendos sturnojn, kaj mi jam trovis sturnidon... Dio sendis al mi...

Kaj Ĵpato, interrompinte pro emocio la parolon, montris sian korbon. Post unu momento ili ambaŭ jam sidis kaŭre apud ĝi kaj Ĵpato jam flue, kvankam malfluite, timante veki la infanon, rakontis al la mirigita kaj ankoraŭ nenion komprenanta mastro la historion de la knabino. Li formetis de la korbo la ŝalon kaj la maljunulo efektive ekvidis ĉarman vizaĝeton de la etulino.

Sed, videble, ŝi dormis jam sufiĉe, - baldaŭ ŝia vizaĝeto sulkiĝis, ŝi eksploretis kaj ekmoviĝis senhelpe. Ĵpato interrompis sian rakonton, klopodeme eksercis apud la infano la sucĉipon kaj, trovinte ĝin kaj malsekiginte, ĝuste kiel instruis lin la virinoj, per salivo en sia buŝo, metis ĝin en la buŝeton. La infano silentiĝis; avideme eksuĉinte la sucĉilon.

La maljunulo, rigardante jen lin, jen la infanon, pensoplene kaj multesignife balancis per la kapo.

Eniris la mastrino, portante du sitelojn da ĵus melkita lakto. Transpaŝinte la sojlon, ŝi starigis sur la plankon la sitelojn kaj haltis, kiel enpasita, kun miro rigardante la virojn.

— Kion vi faras?.. - ŝi diris ne moviĝante de la loko. - Ah, ĵus aŭdis kvazaŭ infanan plor-

Importante

on... Ŝinjoro Kreinto!.. - Ŝi ekkriis, parinte kelkajn paŝojn antaŭen kaj haltinte antaŭ la infano. - Kies ĝi estas? Kie vi prenis ĝin?..

Filip Vasiliĉ mallongige sciigis al ŝi ĉion jus aŭditan de Ĵpato. Ŝi ankoraŭ ne finis sian rakonton, kiam la viziro, tute atentante nek la rakonton, nek malkuraĝajn protestojn de Ĵpato, elprenis la infanon el la korbo.

— Ŝinjoro!.. Ŝi estas malsata... kaj tute malseka! - ŝi ekkriis kaj, plu aldoninte nenion, portis la infanon sur la fornegon.

— Nu, ŝi ĉion ordigos, mia amiko!.. Estu trankvila, ĉio estos en ordo... Ŝi ja estas sperta vartistino...

La viroj revenis al la tablo. La mastro metis antaŭ la gasto teglason kaj mielon kaj tiu daŭrigis rakonti pri sia aventuro. De la fornego aŭdiĝis infana plorkrio kaj murmurema, tamen apenaŭ la voĉo de la mastrino klopodinta.

— Hm, kion do vi faros nun? - demandis la mastro, jus Ĵpato finis sian rakonton.

— Mi komencos „la novan vivon"! - ŝenhezite kaj tuj respondis Ĵpato kun antaŭa rideto sur la juniĝinta, gaja vizaĝo.

— Vi estas stranga homo, Ĵpato Saviĉ... Mi treĝojas, ke vi komencos „la novan vivon", sed ĉu vi pripensis serioze la aferon? La knabino ja ne estas hundido... Ŝi postulos klopodojn, zorgojn, plegadon... Kaj kiu plenumos ĉiontion ĉi? Tio ĉi estas konvena al virino... Kaj eĉ ne ĉiu virino povscios...

— Kaj Dio?.. Dio helpos!... Mi nek manĝos, nek trinkos!.. Dio vidas, mi volonte pasigados tutajn noktojn... Eble, iu helpos... En la mondo ankoraŭ estas multaj bonaj homoj.

— Oni helpos... sendube... Tiu ĉi afero estas bona, bone vin Dio, Ĵpato Saviĉ. Donu ripuĝejon al fremda, forlasita infano estas sankta afero. Mi aŭdis de niaj maljunuloj saĝegan antikvan sentencon: „Ne konstruu preĝejon, sed donu ripuĝejon al orfo"!.. La afero estas plaĉanta al Dio.

Kaj longe ankoraŭ la viroj priparolis la aferon. Kaj ju pli longe ili parolis, des pli klare estis por Filip Vasiliĉ, ke Ĵpato plene-pripensite prenis sur sin la malfacilan kaj respondecan, tamen tre noblan kaj plenumeblan taskon.

— Nu, Ĵpato Saviĉ, via filino nun estas sata kaj seka, - diris la mastrino, sidiĝante apud la samovaro. - Kaj kia belulino ŝi estas!.. Ŝi estas anĝelo, sed ne knabino... Ĉu vi scias ŝian nomon? Ĉu oni baptis ŝin?..

Ĵpato ne rapidante elprenis el poŝo la leterpaperon, trovitan en la korbo kaj silente etendis ĝin al la virino. Ŝi trarigardis ĝin kaj siavice, nenion komprenante en ĝi, transdonis ĝin al la edzo. Tiu kun graveco metis sur la nazon la okulvitrojn kaj, metinte la paperon al la lampo mem, solene kaj laŭte tralegis ĝin.

Lektüre

— Gloro al Dio! - diris la virino kaj faris krucosignon. - Ŝi estas baptita... Kia estas ŝia nomo?..

Ripetu.

— An-ge-li-na! La nomo estas sagaca, - respondis la mastro.

— Neniom sagaca ĝi estas. Mi diris, ke la knabino estas vera anĝeleto, nu, la nomo estas ĝuste konforma al ŝi, - aldonis la mastrino.

Oni longe kaj nerapidante trinkis varmanteon, interŝanĝante malongajn frazojn, kiuj ĉiam kaj sole koncernis la knabinon. La mielo aldonis apetiton, ŝvito briletis sur la vizaĝoj. Oni viŝis ĝin per viŝtuko, laŭte ekspiradis pro ĝuo kaj ree trinkis. Antaŭ fino de la tetrinkado oni decidis, ke Vera Prokofjevna (ĝi estis la nomo de la mastrino) akompanos Ĵpaton ĝis lia budo, pasigos tie la nokton kaj instruos lin lavi kaj nutri la infanon. Ĉiuj estis bonhumoraj kaj ĝojaj, kvazaŭ memaĝere falis de la ĉielo sur tiujn ĉi bonajn kaj simplanimajn homojn ia neatendita feliĉo.

— Hm... hm... - murmuris Filip Vasiliĉ, kiam lia edzino kaj Ĵpato jam estis tute vestitaj kaj pretaj foriri, - la knabino estas baptita... ni supozu... ni kredu ĉi tion, sed kiu estas ŝiaj baptogepatroj? Kio estos: ŝi kreskos kaj konos nek la gepatrojn, nek la baptogepatrojn... ne bone, ne bone...

— Atendu, ni vidos... Nu, adiaŭ! Restu kun la Sinjoro! - diris la mastrino, farante krucosignon kaj prenante en la brakojn la knabinon.

— Memaĝere... - diris Ĵpato zorgatakite, - ni nek pripensis, nek priparolis ĉi tion, tamen la afero estas tre grava. Filip Vasiliĉ, mi ŝatas vin kaj estimas, kiel patron... estu ŝia baptopatro, ne rifuziĝu, mi petas...

La vizaĝo de la maljunulo ĝoje ekbrilis. Li leviĝis de sia loko kaj, etendante la manon al Ĵpato, diris emociplene:

— Dankon, dankon, Ĵpato Savić!... Mi ne forgesos...

— Kaj vi, - Ĵpato sin turnis al la mastrino, - kaj vi, Vera Prokofjevna, estu...

Ŝi anstataŭ respondo jese ekbalancis per la kapo kaj forte, amplene alpremis la infanon al sia brusto.

— Nu, - ĝoje ekkriis la mastro, - nun la afero estas ĝuste aranĝita, nur ni ne festenis...

— Ni morgaŭ aranĝos baptofestenon... ĉe mi, - interrompis lin Ĵpato. — Volu ĉeesti ĝin. Nu, bonan noxton, kara baptano!..

Ĵli eliris.

VI.

Baldaŭ famo pri la age de Ĵpato disvastiĝis tra la ĉirkaŭaĵoj kaj longe estis arde priparolata ĉiuflanke. Unuj mallaŭdis Ĵpaton pro lia nepripensita kaj tro rapidema

ago kaj antaŭdiris ĉiujn ellajn malbonajn servojn aperontaj el tio: ŝi parolis, ke la infano baldaŭ tedos al la viro, ke li siavice sekrete metos ien la korbon kun la filino por liberiĝi de ŝi; ke la infano sendube baldaŭ mortos pro manko de prizorgado; ke, se la knabino pro ia miraklo restos viva, ĵus ŝi fariĝos plenaĝa, mpre aperos de ie, kiel ĉiam okazas en similaj okazoj, ŝia vera patrino kaj postulos ŝin de Ĵpato. Aliaj indignis, ke li antaŭe neniun sciigis pri sia deziro akcepti adoptotan infanon, ke inter malriĉaj servantoj de la servojo estas multaj multinfanaj familioj, kiuj kun ĝojo donus al li eĉ ne unu sian infanon kaj nur tre ne multaj defendis Ĵpaton kaj pensis pruvi al siaj kontraŭuloj, ke la infano trovita ne estas ia hundaĉo, ke Ĵpato faris agon laŭdindan, akceptinte la knabinon, kiam neniu volis akcepti ŝin. Ĉiuj tiuj ĉi opinioj ne estis sekreto por Ĵpato, kontraŭe, dum ĉiutagaj renkontiĝoj kun Kiška kaj aliaj oficirkolegoj, kiuj, preterirante lian budon, enkomenco nepre viziteadis ĝin por proprokule vidi la strangulon kaj lian knabinaĉon, li estis informata pri ĉio, kion opiniis pri li iu ajn. Kelkaj el ili, precipe Kiška, nekontentiĝis informante Ĵpaton pri „onidiroj" kaj, por fari pligrandan impreson je li, ofte senhonte enformo de cirkulanta famo prezentis fruktojn de sia propra libera elpenso. Sed Ĵpato ordinare dediĉis tiom malmulte da atento kaj interesa al tiaj sciigoj, ĉiam estante okupita en siaj pensoj je la knabino, ke la informantoj, vidante lian indiferentecon kaj senfruktecon de siaj penoj, baldaŭ devis silentiĝi kaj iompostiom tute rompis siajn antaŭajn amikajn interrilatojn kun li, kion Ĵpato renkontis ankaŭ ĝoj indiferente kaj sen iu bedaŭro.

Nur Filip Vasiliĉ kaj lia edzino - la baptogepatroj de la knabino - fariĝis ĉiamaj vizitantoj de la budo de Ĵpato kaj neanstataŭeblaj helpantoj de li. Ili ambaŭ amis la knabinon, kiel sian filinon kaj eĉ unu tagon ne preterlasis ne viziti nte ŝin. Kelkaj konkoraj vizitoj, instigataj de scivoleco kaj ne falsa simpatio al Ĵpato kaj kompato al la infano, iafoje aperis en la budo por provizi la knabinon jen je lakto, jen je ĉiponaĵoj, kiujn Ĵpato akceptis kun danko kaj nekaŝata konfuzo, konsciante, ke sola li devus zorgi pri ŝi.

Kuris tago post tago, pasis la printempo, varma somero kaj aŭtuno. Senŝanĝe en fiksitaj horoj aperis de ie kun obtuza bruego kaj ree rapidege - ne haltante malaperis ien pasaĝeraj vagonaroj, preskaŭ senĉese tage kaj norte pli malrapide, sed pli brue kaj ĉiam skuante per sia peza movado la fundamenton mem de la budo, preterkuris senfine-longaj kaj senvivaj ŝarĝvagonaroj, enuige kaj tedeme kiel antaŭe, telegrafaj metalpadenoj kantis pri io, kion ankoraŭ povis kun preni neniu mortemulo, nur nun en ĝi jam aŭdiĝis por Ĵpato neniaj riproĉoj. Ununorte, nenio ŝanĝiĝis ĉirkaŭe, krom Ĵpato mem, sed tiu ĉi ŝanĝo aŭ ne estis rimarkebla por li, aŭ li tute ne volis kaj ne havis tempon por rimarkiĝin. Sed por ĉiu flanka homo ĝi estis nekaŝebla kaj frapanta.

Li iom plikurbiĝis kaj maldikiĝis, fariĝis silentema kaj neparolema, tute nek drinkis plu bran-

virtuozo

r. ž

medfelija - zlog se-bonšance

lon, nek, ĉefe, uzis en sia parolo abomenindajn insultajojn, je kiuj li estis antaŭ nelonge tia vi-
ŝuro. Hilda felića rideto ludis sur lia sunbruniĝita vizaĝo kaj maldikaj lipoj ĉiam flustris ion, kion
jn li laborus. Enviemaj homoj, kiuj ja mankas nenie, parolis, ke maljuna Filip Vasilić ensorĉis lin,
ed pravecon aŭ malon de tiu ĉi kulpigo juĝu legantoj mem, sed ni nur aldonos, ke efektive Ĵpato
nun tre similis al li en sia vivmaniero kaj agoj.

Esplorinte la relvojon, li rapidis hejmen kaj jam senelire restis en sia budo ĝis veno de alterna pasaĝera
vagonaro, lulante sian filinon kaj kantante improvizitajn lulkantojn ne sagacajn je sia enhavo kaj
formo, tamen plezajn de amo kaj sento, aŭ, kiam ŝi dormis trankvile, kortuŝe senmove kliniĝinte super
ŝi kaj ne deturnante sian rigardon de ŝia beleta, anĝelsimila vizaĝeto. Kion li pensis dum tiuj mi-
nutoj, pri kio li revis, fikse rigardante la infanon? Estas malfacile respondi je tiu ĉi demando,
sed ĉiu, kiu ekrigardus lin dum tiuj minutoj, senhezite dirus, ke li, sendube, tiam travivis plej
feliĉajn minutojn.

Eĉ antaŭe, vivante sola, Ĵpato kontentiĝis je plej simpla nutraĵo, sed nun krom sekala pano li
manĝis preskaŭ nenion, penante ŝpari por la filino ĉiun ŝpareblan kopekon. Li dormis malmulte,
pli ofte sur la planko apud la lulilo, sed lia dormo estis neniam profunda aŭ daŭra, - suficis unu
apenaŭ audeblan movo de la infano en la lulilo aŭ plorkrieto kaj li jam ree staris kaj kantis sian
lulkanton kun feliĉa, ridetanta mieno, neniom bedaŭrante pri la dormo interrompita kaj anko-
raŭ malpli ĉagrenante je la kapriculino.

La knabino kreskis sana, kvankam malsanetoj, tiom propraj al infanaĝo, iafoje ankaŭ viz-
itis ŝin. Dum tiaj malfeliĉaj tagoj, feliĉe maloftaj, Ĵpato tute nek manĝis, nek dormis. Delikate
flegante per siaj malgraciaj, maldelikataj fingroj la senhelpan korpeton de la infano kaj penan-
te iamaniere, laŭeble, helpi al ŝi, li tremis pro timo, ke ĉiu minute li povis senigi je la knabino, kiu
nun estis „ĉio" por li kaj vivo sen kiu estus jam neimagebla, ne ekzistanta por li. Lia malgaja, zorgataxita
vizaĝo senĉese turniĝis kun serĉorta petego de la ploranta vizaĝeto de la malsanulino al amplena
vizaĝo de la Savinto, kiu ĉe tremetanta lumo de lampeto milde etendis al li de la ikono sian ben-
antan manon kaj enigis en lian koron savigan esperon kaj trankviligon. Ĉe li sola, genuiĝinte, li
serĉis helpon en sia, ŝajne, senelira malfeliĉo, kaj sola Li ofte en tiaj tagoj aŭdis en nokta silento
simplan, tamen ardan kaj fervoran preĝon de la malfeliĉulo, en kiu tra plorĝemoj kaj profundaj
ekspiroj senĉese ripetiĝis sole-kara por li nomo - Angelina.

VII.

Kvankam nur unu verston apartigis Filip-on Vasilić de la baptofilino amata,
kvankam piedvojeto, kušinta laŭlonge de la relvojo, laŭ kiu li ĉiam vizitis ŝin, estis ĉiam trairebla

ankaŭ, kaj tiele ĉefe, zorgo

kaj nek dum pluva aŭtuno, nek dum riĉnega vintro prezentis ian malhelpon, tamen de jaro al jaro, laŭmezure de tio, kiel kreskis la knabino, li kaduksiĝis kaj ĉiam pli ofte bedaŭris, ke li ne povas pli ofte viziti la kaptanon kaj pli longe resti apud la belulino-kaptopilino. Jam delonge li revis aĉeti negrandan terpecon, konstrui modestan dometon kaj ĉesigi la servon, kiu ĉiam fariĝis por li pli malfacila kaj pli ŝarĝa. Kun al tio ĉi instiĝis lin ne sole soifo de meritita trankvilo, sed ankaŭ kaj, eble, ĉefe, zorgoj pri la senhejma kaptopilino.

„Baptano Ĵpato rimarkeble maljuniĝas, – ofte li pensis. – Ne, se mi kun la maljunul-ino mortos... kaj li subite malsaniĝos, aŭ se okazos ia alia malfeliĉo... se, ekzemple, oni forpelos lin el la budo, kien li sin metos kun la knabineto?.. Krankam la filino kaj la bofilo... gardu ilin, Sinjoro, ili estas bonaj homoj... Krankam ili ofte aludas al mi, ke mi por ĉiam transloĝiĝu al ili, tamen estus pli bone, se mi akiros mian propran angulon... Dank' al Dio ni ja havas ion, dum la vivo mi kun la edzino Ŝparis ion... ĝi estos sufiĉa por... eĉ restos io al ili... al la bofilo kaj al la filoj... Neniu plendos post nia morto, ke la gemaljunuloj vivis malŝpare... neniu ofendiĝos, se mi uzos iom da mono ankaŭ por ŝi... Jes... jes... Kaj ŝi kreskas!.. Baldaŭ ŝi estos tute granda knabino, estus ĝustatempe instrui ŝin legi... La kaptano estas pia homo, sed li malmulte scias la Sanktan Skribon... Li mem ne sufiĉe porscias legi... Li ne porscios instrui ŝin kaj la ofic servo ĉiam malhelpos al li fari tion ĉi... Jes!.. Kaj se mi loĝus ie pli proksime, mi ĉion aranĝus... Mi alkutimigus ŝin, mi instruus... mi havus sufiĉe da tempo... Kaj se oni ne instruos, ne alkutimigos homon dum junaĝo, tion tiu homo ne akiros dum la tuta vivo... Ŝi helpus al mi en abeledukado... Bonega okazo por alkutimigi inpanon al laboremo..."

Tiel revis senĉese la maljunulo kaj ofte li songis siajn revojn efektiviĝintaj. Tamen li neniam ankoraŭ sciigis al iu siajn planojn kaj revojn, eĉ al la edzino.

„Por kio mi sciigos ilin al ĉiuj antaŭtempe?.. – li pensis. – Ne, mi supozu, mi rakontos al la edzino, al la kaptano... Ĉiuj sciiĝos... Kaj kio estos, se io malhelpos al mi?.. Oni bedaŭros, eble, riproĉos min, ke mi ne pli frue... Ne, estos pli bone, se mi silentos ĝis kiam venos favora okazo, estu volo de Dio!"

Kaj la okazo baldaŭ venis.

Unufoje aŭtune Filip Vasiliĉ devis pasigi du tagojn en la budo de Ĵpato. Ĵpato forveturis en la urbon por aĉeti iom por la knabino kaj la kaptano volonte konsentis anstataŭi lin dum lia foresto. Estis bela, varma tago. De la sennuba blua ĉielo afable rigardis la suno, eble, jelasta foje, antaŭvidante baldaŭajn neviteblajn akompanantojn de aŭtuno-densajn nebulojn kaj pluvojn. La duonnudigita arbaro hele brilis per sia maldensa flaviĝinta foliaro kaj, starante en sen-

nova silento, ŝajne, ĝuis agrablan dormeton post la kuplena riveca somero, kiel piediranto, far-
inta longan kaj lacigan vojon. Antaŭ nelonge Filip Vasiliĉ revenis el kutima ĉiutaga vojes-
oloradon, kien akompanis lin la kaptofilino, nun jam bela sepjara knabino. Ĵus preterkuris
asaĝera vagonaro. La maljunulo ripozis sur benko apud la ludo, fikse rigardante en mal-
proksimon kaj duonvoĉe kantante ian himnon, kaj Angelina, kiu nun ĉiam signalis al na-
ĉinistoj anstataŭ la patro kaj volis al neniu cedi tiun ĉi plezuron, ĵus revenis el la ludo, kien
ŝi portportis la signalflageton. Ŝi estis bela blondhara knabino iom maldiketa, sed rugĥvanga
kaj rigla. Simpla, tamen pura, rozkolora vestaĵo vilaĝa aldonis al ŝia ĉarma vizaĝo kun de-
kataj regulaj trajtoj kaj grandaj, ne-infane-pensoplenaj, okuloj ian specialan ĉarmecon. La
kapo estis kovrita per blanka katuna kaptuko.

Ĝaje kantetante ion, ŝi elkuris el la ludo kaj longe kuris, saltetante tien kaj reen laŭlonge
de la relvojo. Kiam tio ĉi tedis al ŝi, ŝi alproksimiĝis al unu apudvoja telegrafkolono, alprem-
iĝis al ĝi kaj longe staris senmove, aŭskultante obtuzajn fajfsonojn de la telegrafo. Ŝi jen staris
senmove, almetinte la orelon al la kolono mem, jen frapetis je ĝi per la manoj, kun sciroleco observ-
ante vibradon de la sonoj. Subite ŝi ekstremis, ĉirkaŭprenis per la ambaŭ manoj la kolonon,
ŝi forportis la signalflageton. Ŝi estis bela blondhara knabino iom maldiketa, sed rugĥvanga
kaj rigla. Simpla, tamen pura, rozkolora vestaĵo vilaĝa aldonis al ŝia ĉarma vizaĝo kun de-
kataj regulaj trajtoj kaj grandaj, ne-infane-pensoplenaj, okuloj ian specialan ĉarmecon. La
kapo estis kovrita per blanka katuna kaptuko.

Ĝaje kantetante ion, ŝi elkuris el la ludo kaj longe kuris, saltetante tien kaj reen laŭlonge
de la relvojo. Kiam tio ĉi tedis al ŝi, ŝi alproksimiĝis al unu apudvoja telegrafkolono, alprem-
iĝis al ĝi kaj longe staris senmove, aŭskultante obtuzajn fajfsonojn de la telegrafo. Ŝi jen staris
senmove, almetinte la orelon al la kolono mem, jen frapetis je ĝi per la manoj, kun sciroleco observ-
ante vibradon de la sonoj. Subite ŝi ekstremis, ĉirkaŭprenis per la ambaŭ manoj la kolonon,
iĝis du nekonatuloj. Kvankam tio ĉi povas ŝajni stranga, ŝi, elkreskinta en izoleco, tre mal-
opte havinta okazon vidi homojn, timis ĉiun nekonaton. Kiam la irantoj alproksimiĝis al
ŝi tiel, ke estis aŭdebla interparolado de ili, ŝi rapidege ekkuris al la maljunulo kaj kaŝis
sian kapeton sur liaj genuoj.

— Nu, kio estas ankoraŭ? — afable ekmurmuris Filip Vasiliĉ, karesante per la mano la
dorson de la knabino. — Ĉu vi ree ekvidis iun, timulino?.. Nu, kial vi timas? Neniu ofendos
vin... la homoj estas noblaj, bone-vestitaj, ne ĉiponuloj...

Preskaŭ samtempe la rojirantoj haltis antaŭ la maljunulo, ĝentile riverencis al li kaj
petis akvon. Filip Vasiliĉ, kiu neniam ripuzis al rojirantoj, kiuj ajn ili estus, vidante, ke la ne-
konatuloj estas homoj ĝentilaj, proponis al ili eniri en la ludon kaj ripozi dum li preparos tcon.
La nekonatuloj, ŝajne, estis agrable surprizitaj de la propono kaj servemo de la maljunulo kaj,
ne atendante ripeton de la invito, sekvis post li. Ili, enirinte, faris krucosignon, ree salutis la
mastron kaj, vorto post vorto, nerimarkeble komenciĝis rigla interparolo inter li kaj la gastoj. Ki-
am Filip Vasiliĉ metis sur la tablon samovaron, ili jam supiĉe konis unu la alian reciproke. La neko-
natuloj estis posedanto de tiu arbaro, kiu kuŝis je ambaŭ flankoj de la relvojo kaj kiu kunulo - arbar-
gardisto. Ambaŭ ili ŝajnis al la maljunulo simpatiaj homoj kaj li, post nelonga interna batalo, sci-
igis al la riĉa gasto sian sekreton pri akirota terpeco kaj propra dometo konstruota. Sur

Rvapàüe ĝibĝis

pasĝis, ne: pass

ĝi. La gasto responde tre surprizis la mastron, proponinte al li por ne alta pago kian ajn lokon, laŭ lia plaĉo, apud la budo. La propono plaĉis al Filip Vasiliĉ kaj li, sen longa pripensado, tuj post la te-trinkado iris kun la arbarposedanto en la arbaron kaj elektis belan arbaran monteton, kuŝintan preskaŭ tuj post la budo mem de Ipato.

Unu parton de la pago li devis pagi al la posedanto en la urbo, kien li devis veturi kun li post nelonge por kontrakti la aĉetaĵon, la alian - post unu jaro. La kondiĉoj estis tre favoraj por la aĉetanto kaj li estis tre kontenta je la komenco.

Post unu monato post la budo de Ipato jam sonis gaja arbhakado, - oni hakis dikajn arbojn por liberigi lokon por legomĝardeno kaj florĝardeneto kaj por konstrui domon por la nova ter-posedanto. Antaŭe Filip Vasiliĉ revis pri eta dometo konstruota, sed abunda konstrumaterialo sur la aĉetita terpeco igis lin konstrui pli vastan domon kun ĉiuj necesaj mastrumkonstruaĵoj.

Ĝuste post unu jaro, aŭtune, kiam la domo estis tute preta, li, eksiĝinte de la ofico, por ĉiam translokiĝis en ĝin kun la edzino, la abeloj kaj sturnodometoj.

Ipato kaj, precipe, Angelina ĝojis senlime je la parencaj najbaroj.

VIII.

Neretenebe, nerimarkeble, sinsekve pasis jaro post jaro. Jam ok fojojn la arbaro dum printempoj sin vestis per freŝa smeralda foliaro kaj tiom da fojoj perdis ĝin dum senindulgaj aŭtunoj post kiam Filip Vasiliĉ translokiĝis en la propran domon. Bela ĉizita barilo, ĉirkaŭinta ĝin, jam nigriĝis kaj ialoxe kurbiĝis, brančoriĉaj pomarboj kaj densaj ĉerizarbetaĵoj, plantitaj antaŭ la domo, fariĝis fortaj arboj kaj tute ŝirmis la belan domon de okuloj de preterveturintoj, la sturnodometoj, antaŭe iam zorge metitaj antaŭ la domo laŭlonge de la ĝardenbarilo sur altaj stangoj, antaŭ longe falis, forŝiritaj de ventoj, kaj dum frua printempo matene ne karesis jam aŭdosenton nesilentiĝanta vigla kantado de sturnoj. Filip Vasiliĉ tute griziĝis, kvazaŭ-ĝibiĝis kaj malbone aŭdis, malbone vidis, liaj manoj tremis kaj la rabotstablo delonge estis forlasita de li. Pli grandan parton de tago li pasis en lito kaj sola amuzo por li estis, kiel antaŭe, abeledukado. Lia edzino ankaŭ maljuniĝis kaj kadukiĝis: sen helpo de la baptofilino ŝi jam ne plu povis eĉ moviĝi tra la ĉambroj. La tutan mastrumadon en la domo, ankaŭ en la budo gvidis nun juna mastrino - dekkvinjara belulino Angelina.

Ipato ankaŭ maljuniĝis, ofte plendis je doloro en la lumbo kaj je laceco, tamen li ne volis lasi la oficon, kion delonge konsilis al li la gebaptanoj, kaj translokiĝi kun la filino en ilian domon. Antaŭ longe malkutimiĝinte de babilemo kaj uzado de nekonvenaj insultvortoj, nedisigeble am-

ikig
ado
eto,
lti
on
ulo
pri
per
tar
k
lia
toj
art
gro
gon
p
por
ter
on
gj
nu
in
lib
al
ka
ka
va
as
it
po
g
k
1.

ikiĝinte kun la najbaro-baptano, li ĉe tute forlasis, laŭ lia konsilo, la animpereigan tabakfumadon. Li šatis stari genuiĝinte antaŭ la ikono, lumigita de malhela lumo de kolora lampeto, dum lia, donita de dio, filino malrapide kaj klare laŭte legis akafistojn [1]; li šatis aŭskulti kantadon de religiaj himnoj, je kio bonege instruis la knabinon Filip Vasiliĉ, sed pli ol ĉion li šatis aŭskulti dum vintraj vesperoj pliajn, animutilajn konversaciojn de la maljunulo-baptano kaj, ĉefe, rakontojn de preterirantaj pilgrimantoj pri la Sankta Lando kaj pri vivo de sanktuloj. Li delonge ekamis pilgrimantojn, sekrete envidis al ili kaj neniam permesis al iu el ili preteriri la budon ne ripozinte en ĝi kaj ne akceptinte lian modestan, tamen tutaniman regalon.

Kiška-iama amiko de Ĵpato-mortis antaŭ longe, kiaj infanoj servis ie sur la fervojo kaj lia edzino-vidvino vivis nun almoze. La staciestro, la ĝendarmo kaj multaj aliaj oficistoj de la fervojo jen mortis, jen translokiĝis. Ĉio šanĝiĝis kaj aliiĝis, nur, kiel antaŭe, la arbaro bruis je ambaŭ flankoj de la relvojo, ne silentiĝante sonis metalfadenoj de la telegrafo kaj kun obtuza bruego, sxuante la budon, preterkuris tage kaj nokte sennombraj vagonaroj.

Kaj Angelina? Ŝi ankaŭ šanĝiĝis: ŝi vere estis belulino kaj šia modesta vilaĝana kostumo ne povis kaši de flanka observanto šian „noblan" devenon, kiu evidentiĝis en šiaj noblaj vizaĝotrajtoj, teniĝo kaj iafoje en seriozeco ne konforma al šia aĝo. Malgraŭ tio, pasiginte la tutan infanecon en la arbaro, nenie estinte, neniun vidinte, krom la tri pazenculoj kaj malofte preteririntoj, ŝi estis simila al sovaĝa besteto: ŝi ĉion timis, al ĉio rilatis malkonfide, kvankam tio ne malhelpis al ŝi ĉiam esti obeema, afabla kaj milda. Neniam havinte amikinojn-samaĝulinojn, ŝi sciis nek gajajn kantojn, nek dancojn. Ŝi kantis nur religiajn himnojn, legis psalmolibron kaj biografiojn de sanktuloj kaj antaŭtage de grandaj festoj akafistojn antaŭ la ikono; aliajn librojn ŝi nek vidis, nek supozis pri ilia ekzistado. Ŝi amis, kiel patron, Ĵpaton kaj la gebaptopatrojn, delikate flegis la kaduka n baptopatrinon, senlace klopodis je la mastrumado kaj ofte, en horoj liberaj, starante apud la relvojo mem kun signalflageto en la mano, atendante vagonaron, sin fordonis al neefektivigeblaj revoj. Ŝi penis diveni, kies la filino ŝi estas, kie estas la gepatroj de ŝi, kial ili forlasis ŝin kaj, kun la koro maltrankvile batiĝanta, en ĉiu belevestita sinjorino, okaze rigardanta ŝin tra malfermita fenestro de vagono, penis rekoni sian patrinon.

Unufoje, antaŭ veno mem de pasaĝera vagonaro, kontraŭ la budo haltis manemorata vagoneto, en kiu, krom tri laboristoj, estis la vojestro kaj ia rekonatulo en oficira uniformo, kun la brusto ornamita per ordenoj kaj krucoj. La knabino neniam ankoraŭ vidis tian gravan per-

---

1. Laŭdaj himnoj je honoro de la Savinto, Dipatrino kaj sanktuloj, tiom similaj al katolikaj litanioj.

sonon kaj tuj jam infane-naive decidis, ke li estas la caro. Dum la laboristoj rapidege forpetis de la relej la vagoneton por liberigi la vojon por la alproksimiĝanta vagonaro kaj la vojestro expaŝis al la budo, ekbalancinte per la kapo al la knabino, la ordenito haltis ĝuste kontraŭ ŝi kaj, ĝentile riverencinte al ŝi, longe fikse rigardis silente jen ŝian belan vizaĝon, jen la vestaĵojn, dum ŝi, konfuziĝeme malleviute la okulojn, senmove staris sur la loko. Li estis altkreska bravulo de kvardek jaroj proksimume kun sunbrunа vizaĝo kaj longaj jam griziĝantaj lipharoj.

— Kia estas via nomo, mia infano? — li, fine, demandis kun afabla rideto sur la lipoj.

— Angelina... — malkuraĝe, apenaŭ audeble respondis la knabino kaj ruĝiĝis.

— Kia bela nomo! — kuraĝige daŭrigis la nekonatulo. — Eble, vi nerefuzigos kontentigi mian scivolecon, mi volus scii, kiomaĝa vi estas? — li daŭrigis kun rekta emocio en la voĉo.

— Dekkvin... — ŝi respondis ankoraŭ pli malaŭte kaj, ekaŭdinte bruegon de la alproksimiĝanta vagonaro, ŝi, kvazaŭ vekiĝinte de profunda sorĉa sonĝo, tuj, konsciante tutan gravecon de sia devo, faris kelkajn pašojn al la relvojo, rektiĝis, etendis antaŭen la dekstran manon kun signalflageto kaj rigidiĝis en tiu ĉi senmova pozo.

Ŝi rekonsciiĝis nur kiam la vagonaro malaperis el la okuloj. Tineme ekrigardinte ĉirkaŭe, ŝi rimarkis, ke la nekonatulo jam forestis. La laboristoj ree metis sur la relojn la vagoneton, tra la fenestroj de la budo aŭdiĝis laŭta malkontenta voĉo de la vojestro kaj ies la alia — pli mola kaj pli delikata. Ŝi tuj rekonis ĝin.

Dume Ĵpato sidis en la budo, flikante ŝuojn de la knabino. Subite, ekaŭdinte la vagoneton, li almetiĝis al fenestro kaj kun scivolemo, miksita kun maltrankvilo, ekrigardis la sinjorojn. „Kion, — li ekpensis, — bezonas de mi tiaj gravaj personoj?" — kaj ĉe ne moviĝis de la loko. „Kredeble, — li daŭrigis pensi, — ili veturas ien alilokeu kaj haltis ĉe mi nur por preterlasi la kuranstan vagonaron, ja tio ĉi okazas iafoje." Li ĉiam rigardis, kiel antaŭe, tra la fenestro: subite li ekvidis, ke la ordenito alproksimiĝis al la knabino kaj jam ion ekparolis kun ŝi, dume lia kunulo — Ĵpato tuj rekonis en li la vojestron, kiun li vidis supraĵe du-tri fojojn en la stacidomo — tuj ekpaŝis al la budo. Ĵpato konfuziĝis, ĉe ne malfermis la pordon por la gasto. Tiu eniris estre, fiere, ĉe per kapoklino ne salutis la mastron, kaj tuj demandis:

— Ĉu vi estas fervojgardisto Ĵpato?

— Ĝuste tiel, via moŝto, — Ĵpato respondis, riverencante al li.

— Ĉu vi trovis antaŭ kelkaj jaroj en la stacidomo forlasitan sufĉinfanon, knabinon?

— Mi trovis, — humile respondis Ĵpato, ne povante ankoraŭ kompreni, kion oni celis per la de-

mandoj.

—Ĉu ŝi estas tiu knabino?... —li kapsignis je la fenestro.

—Ĝuste ŝi estas, via moŝto...

—Nu, dankon! —li diris, ekspirinte kun plifaciliĝo. —Oni tute elturmentis min, deviginte min trovi ŝin. Ni longe serĉis ŝin, nu, almenaŭ nun ni trovis! Bone... Kune kun mi venis unu tre grava sinjoro, meritoplena generalo, la patro de tiu ĉi knabino...

Ĵpato kaptis per la manoj la muron por ne fali, ĵus li ekaŭdis la lastajn vortojn. Tiutempe eniris la generalo.

—Nu, jen, via generala moŝto, —la vojestro gaje ekparolis, —fine, ni trovis. Ĉu vi vidis, ĉu vi rekonis ŝin? —kaj ree, sin turnante al Ĵpato, li daŭrigis: —Estus tre longe, se mi ĉion rakontus al vi, kiel okazis, ke oni forlasis la infanon, sed tio ne estas grava... Diru, ĉu vi redonos la knabinon al la gepatroj? Ŝia patrino nun estas treege malsana, sopirante je ŝi, kaj doktoroj konsilis nepre trovi kaj reveni al ŝi la filinon, alie la malfeliĉulino mortos. Jen estas ŝia patro... Vi mem, via generala moŝto, nun priparolu kun li la aferon, —li ree sin turnis al la generalo.

La generalo ekrigardis Ĵpaton milde, afable. Poste li diris:

—Nu, bona homo, ni inde rekompencos vin, nur diru, ĉu vi redonos al mi la filinon?..

—Via generala moŝto!... —malespere ekkriis Ĵpato. —Kiel mi redonos ŝin?.. Ŝi estas por mi „ĉio"! Kun kiu mi restos?.. Ĉu por tio mi pasigis super ŝi —inpaneto sennombrajn sendormajn noktojn, ĉu por tio mi ploris super ŝia lulilo dum tutaj noktoj, kiam ŝi malsanis?..

—Jen, kia vi estas!... —la vojestro interrompis Ĵpaton, kolereme rigardante lin, —kaj se oni pezorte forprenos ŝin de vi? Ĉu vi pensis iam pri tio?..

Neniu rimarkis, kiel la knabino per neaŭdeblaj paŝoj englitis en tiu minuto en la budon por meti la signalflageton sur la lokon. Farinte tion ĉi, ŝi rapideme foriris, sendube fermante post si la pordon. Sed, kvankam ŝi restis en la budo nur unu mallongan momenton, en ŝia memoro engravuriĝis por longe la minacaj vortoj de la vojestro, kiujn ŝi bone aŭdis. Tiuj ĉi vortoj, ankaŭ la humiliga, mizera pozo de Ĵpato, tute konsternis ŝin. Apud la fornego, ŝi vidis, staris humilega figuro de pala Ĵpato —ŝia bona patro emociita. Ŝi ankoraŭ neniam vidis lin tia kompatinda, senhelpa kaj kontraŭ li kun estra sintenado, elstariginte unu piedon antaŭen, staris la vojestro, svingante per blanka ganto, kaj severe, laŭtvoĉe parolis al li la minacajn, timigajn vortojn.

Metinte la manojn post la kapon kaj forte kunpremante per ili sian dikan kaj molan harligon, ŝi flugrapide ekkuris for de la budo, de la kortrancanta ofenda sceno, de la timigaj enigmaplenaj vortoj. Trakurinte la ĝardenon kaj larĝan korton post la domo, ŝi glitenkuris en la fojn-

malforte, neforte, eFe

jon, sin jetis sur molan bonodoran fojnon, kovris la vizaĝon per la manoj kaj eksplodis laŭte, konvulsie, nedeteneble.

— Trankviliĝu, sinjoro, — siavice interrompis la vojestron la generalo, — mi komprenas lin... Liaj sentoj kaj aldoniteco al la knabino estas ja tiel naturaj, tiel kompreneblaj... — kaj, sin turnante al Ipato, li aldonis: — mi ne volas perforte!.. Ĥi, mia kara, ĉion pripensos, ĉion priparolos. Ĥi tute ne volas ofendi vin, kontraŭe... Bedaŭrinde, hodiaŭ ni ne havas tempon por tio. Baldaŭ mi ree venos... Kvankam mi interparolis kun la knabino, tamen mi ne diris al ŝi, kiu mi estas, ankaŭ ni ne parolu al ŝi tion ĉi, ke ŝi ne maltrankviliĝu...

Sed Ipato plu aŭdis nenion. Kiam la sinjoroj eliris, li falis sur la benkon kaj eksplodis maldolĉe, malespere, kiel, ŝajne, li ploris ankoraŭ neniam.

IX.

Tiutempe Filip Vasiliĉ, nenion sciante pri la okazinta, bonhumore kuŝis en sia lito kaj laŭtvoĉe, ne rapidante, rakontis ion edifan el sia infaneco al sia okjara nepo. La knabo, large malferminte la okulojn kaj kunpremінte persiaj manetoj la vejnecan manon de la avo, kuŝintan sur liaj genuoj, aŭskultis avide, detenante spiradon.

Ekkonaris la pordo, en la ĉambron malkuraĝe eniris Ipato. Lia vizaĝo estis pala kaj zorgataksita. La avo tuj ĉesigis la rakonton kaj demande ekrigardis la venintон.

— Avo!... Avo, nu, diru, kion li rakontis al vi?.. — malpacience ekkriis la knabo, facile puŝante lin je la mano.

La avo, anstataŭ respondo, liberigis sian manon el la kroĉiĝema manoj de la nepo kaj silente deflankigis lin. Dume Ipato alpaŝis al la maljunulo kaj rivezencis al li.

— Bonan tagon! — li diris hezite, etendante la manon al la kapitano.

— Bonan tagon! Sidiĝu, estu gasto... Mi ankoraŭ ne vidis vin hodiaŭ, — tiu diris responde, ne leviĝante de la loko kaj fikse rigardante la gaston. — Ĉu vi estas sana? Via vizaĝo estas tia... aŭ io okazis malbona al vi?..

— Okazis!.. Ho, okazis, kapitano!.. Mi eĉ ne povas elparoli...

La maljunulo rapidеme leviĝis de kuseno, sidiĝis, faris krucosignon kaj ree demandis kompateme:

— Ĉu iu ofendis vin, kapitano?

— Oni ofendis min!.. Ho, kiel oni ofendis... — balbutis Ipato, tremante, kiel enfebro, kaj sidiĝante apud la kapitano.

— Ĉu oni eksigas vin?.. Ĉu oni pelas vin el la kudo?.. Trankviliĝu, tio ĉi estas negranda

malfeliĉo... La domo estas granda, mi delonge jam petas vin...

—Ne!.. ne, kaptano!.. Ne tio... Ĵo pli malbona...

—Mia Sinjoro!.. Nu!.. Nu, rakontu... parolu... Transviliĝu kaj parolu!.. Ni kune pripensos la aferon, priparolos. La Sinjoro helpos al ni kaj ni...

—Oni intencas forpreni... forpreni perforte mian trezoron, mian Angelina-n!..—kolektinte fortojn, kiom li poris, diris Ĵpato kaj senhelpe, ploregante falis sur la ŝultron de la amiko.

—Sinjoro!..—tiu, surprizita, poris nur diri, turnante sian rigardon, plenan de petego, al ikono.

Dum unu minuto en la ĉambro regis turmentiga, enigmoplena silento,-nur aŭdiĝis plorĝemoj de Ĵpato kaj apenaŭ aŭdebla flustrado de la konsternita maljunulo, kiu penis, kiel ĉiam, trovi por si subteron kaj konsolon ĉe Dio.

—Sed, eble, kaptano, oni babilas ĉi tion senbaze?—fine, komencis Filip Vasiliĉ kaj malforta radieto de espero jam trakuris lian sulkoplenan vizaĝon.—Ĉu oni povas kredi al tio ĉi? Ĉu vi aŭdis?.. Ĉu iu penis iam forpreni hundaĉon trovitan de iu kaj kreskigitan?—en liaj okuloj jam brilis certeco, ke, fine, li trovis konvenajn argumentojn, ke la tiino, kiun li ekzentis dum la unua minuto, estis antaŭtempa kaj vana.—Pripensu, kaptano!.. Kaj nia Angelina estas ne hundaĉo, sed homo, kiun ni... kiun vi kreskigis kaj edukis dum dekkvin jaroj... Ne kredu, karulo, ne kredu, oni mensogas. Neniu forprenos...

—Se oni nur babilus, kaptano,—rektiĝante, interrompis lin Ĵpato,—sed jus vizitis min antaŭ veno de la vagonaro la vojestro kaj unu generalo... la patro de ŝi...

Filip Vasiliĉ eksentis, ke la planko, sur kiu li jus staris, malrapide ekmoviĝis for el-sub liaj piedoj, kaj tuta antaŭa longa espero tuj foriĝis senrezerve.

—Ĉu la patro mem?..—li nur povis diri surprizita.

La maljunulino-mastrino, ekaŭdinte en sia ĉambro la voĉojn kaj ploron, rokis la edzon.

—Kio okazis, vi ploras?—ŝi demandis lin, jus li eniris.

—Malfeliĉo!.. Ĵru, Ĵpaĉjo ĉion rakontos... Ĵe troviĝis la patro de nia Angelina... Li parolas, oni volas forpreni ŝin...—li flustris al ŝi, kondukante ŝin je la mano.

—Ĉu vi freneziĝis?.. Ni ne fordonos, ni ne fordonos!..

La maljunulino preskaŭ svenis kaj Filip Vasiliĉ devis uzi multe da penoj por alkonduki ŝin al sia lito, sur kiu, kiel antaŭe, senhelpe, senespere sidis Ĵpato kaj ploris.

Viŝinte la okulojn per maniko kaj penante akcepti trankvilan mienon kaj voĉon, Ĵpato komencis sian malĝojan rakonton. Sed, malgraŭ la tuta penado konservi trankvilecon, li ofte interrompis sian parolon por subpremi larmojn, kiuj ĉiam staris en la okuloj, pretaj ekflui, kaj por ne elmontri sian emocion.

efektiv

Ŝi finis. La genaĵunuloj silentis, malgaje malleviante la okulojn kaj evitante ekrigardi unu la alian. La silento daŭris jam kelkajn minutojn, sed neniu rapidis sin aldoni al la akontita, eldiri siian opinion aŭ konsilon, kvazaŭ timante ~~mala~~ malutili al la afero, kaj esperante, ke, eble, iu alia pli ĝuste, pli bone plenumos tiun ĉi taskon.

— Ĉu ni pardonos ?.. – fine, trarompis la silenton malforta voĉo de la maljunulino. – Ĉu por tio ni eduis ŝin, gardis ?.. Kiu do flegos nin, kiu enterigos ?.. – Ŝi eksploris kaj ŝia griza haro kapo maljuna ekskuiĝis konvulsie pro malespera perspektivo, kiu tiel reliefe subite ekstaris antaŭ ŝiaj okuloj.

— Ni havas filinojn, ili ne forlasos nin, – rememorigis Filip Vasiliĉ al la edzino. – Jen, la kapitano, – li oriulsignis al ŝi Ĵpaton, – efektive havas neniun !.. Sed estu volo de Dio, sen Lia volo eĉ unu haro ne falas de nia kapo, mia kara kapitano, – li aldonis, karesante per la mano Ĵpaton je la ŝultro.

— Jam tia estas mia sorto : antaŭe mi estis sola, nun ankaŭ... – malaŭte eksplustris Ĵpato.

— Sed ĉu vi memorere decidis pardoni ŝin ? – la maljunulino ree demandis. – Mi ne permesos... mi neniam konsentos...

— La sinjoro estas meritoplena, grava persono... li ne forprenos ŝin perforte, li diris... – tute neĝustaloke enmetis sian konsideron Ĵpato.

— Se sinjoroj volos ion, ili faros tion, ĉar... – komencis Filip Vasiliĉ, sed tuj li estis interrompita de la edzino.

— Ĉu estas tia leĝo ?.. – ŝi diris.

— Tia leĝo ne estas, mi scias, sed, se oni volos, oni trovos alian leĝon, favoran por si... La sinjoroj nesimilas al ni – malkleruloj... Ili konas ĉiujn juĝistojn kaj tiuj, kion ajn faras, restos praveaj... Klerece, lerteco kaj mono havas grandan forton... Se la knabino estus adoptita, nu, tiam estus tute alia afero...

— Ĉu mi ne parolis al vi, ke vi adoptu ŝin ? – riproĉe enmetis la maljunulino.

— Vi parolis. Sed se ni havus tempon portio !.. Ĉu mi aŭ kapitano Ĵpato havis iam suspiĉan tempon portio ? Portio ni ja devus longe klopodi en la urbo... Kun tio ĉi estas nekorektebla kaj ni havas ĉi nenian dokumenton...

— Kiel nenian ?.. – demandis Ĵpato.

— Ĉu vi havas ian ?.. – ekmiris Filip Vasiliĉ. – Kian ?

— Tiun, kiu estis en la korbo kun la infano, – grave tone kaj serioze diris Ĵpato.

— Nu, ĝi ne estas oficiala dokumento, ĝi valoras nenion...

Ili interparolis longe kaj, kvankam atingis nenian konkludon, tamen, disiĝis, kiel ĉiam okazas post sincera konversacio, kun plifaciligitaj animoj. Metinte la tutan aferon je

...lo de Dio, ili, pro kompato al la knabino, interkonsentis neniom paroli al ŝi pri la okazinta ...is kiam la afero mem klariĝos.

X.

Ĉiuhore, ĉiuminute, tage kaj nokte atendante kun la koro premegita, ...ejen zee venos subite la vagoneto kun la generalo kaj... (je tio ĉi pensoj de li ĉiam interrompiĝ- ...kaj lia imago ne kuraĝis iri pluen), ĵpato extremadis ĉe ĉiu bruo de malproksima ŝarĝvago- ...aro, ĉe ĉiu ekpapo. Dum la lasta tempo li pariĝis ankoraŭ pli silentema, zorgatakita kaj ze- ...igicma. Kiam apud li estis la knabino, li longe fikse rigardis ŝin kun amo, kvazaŭ diaŭan- ...e, kaj senĉese silente karesis ŝin per la mano je la kapo.

La knabino ankaŭ ŝanĝiĝis. Kvankam ŝi kaŝis sian sinrolecon kaj neniun demandis pri la mis- ...eraj vizitintoj, kvankam ŝi, post la sceno, vidita en la budo, estis ofendita, ŝia koro antaŭsentis ...on, ŝi malklare konjektis, ke oni havas ian sekreton, rilatantan proksime al ŝi, dolĉe zevis pri io ...nova neeviteble-okazonta kaj ankaŭ atendis ion.

Estis vespero de ia festo. La suno jam malsupreniĝis post la arbaro kaj en la budo regis krepus- ...o. Apud fenestro mem, metinte libron sur la fenestron, sidis Angelina kaj kun granda entu- ...iasmo legis biografion de ia sanktulo. Vestita feste, ŝi nun, kun rugiĝintaj vangetoj kaj ...malsuprenpalintaj bukloj, estis neordinare ĉarma. Ĵpato sidis je la tablo apud alia fenestro. En profunda silento, avidege kaptante ĉiun sanktan vorton, li malrapide trinkis jam mal- ...varmiĝintan teon kaj amplene rigardis la knabinon. Ĉu la libro estis tiel interesa, ĉu li pro- ...fundiĝis en siajn sekretajn revojn, sed li tute ne aŭdis, kiel la vagoneto, atendita kun tia an- ...taŭtimo, senbrue venis kaj haltis ĝuste kontraŭ la fenestroj. Tamen vočoj de la laboristoj kaj ra- ...idaj paŝoj de la generalo rekonsciigis lin. Ĵus li ekstremis, kompreninte ĉion, la pordo malfer- ...iĝis kaj en la budon, tintante per spronoj, eniris la gasto. Apud la sojlo mem li formetis sian ĉa- ...pon, faris krucosignon kaj ĝentile, kun plej afabla mieno, salutante la loĝantojn, kiuj anko- ...raŭ sidis sur siaj lokoj, diris:

— Ĉu mi povas eniri? Ŝajne, mi malhelpis al vi...

Ĵpato rapideme saltleviĝis de la benko kaj faris kelkajn paŝojn al la veninto, dume la knab- ...ino, interrompinte la legadon, ne ellasante la libron el la mano, staris senmove, konfuziĝ- ...inte malleviute la kapon. Ŝi estis treege surprizita kaj rolonte sin kaŝus ien, sed estis malfrue.

— Pardonu, — daŭrigis la gasto kun kutima sengêneco kaj ĝentileco de salonulo, siavice far- ...ante kelkajn paŝojn antaŭen, — sed, laŭ mia promeso, mi venis por priparoli la aferon...

Li ne finis la prazon, kvazaŭ hezitante, ĉu li devas, aŭ ne, alpaŝi al la afero en ĉeesto de la

knabino.

— Kian? Ĉu pri la knabino?..- diris Ĵpato, apenaŭ havante portojn elparoli la lastan vorton.

Lia gorĝo sekiĝis kaj sango alfluis al la kapo. ~~(La generalo)~~

La generalo nenion respondis, ekrigardis la knabinon kaj tuj kun decideco alproksimiĝis al ŝi, kunpremis en siaj brakoj kaj kovris ŝian ruĝvangan vizaĝon per kisoj.

— Mia kara... mia kara knabino... - li plustris.

La knabino ne kontraŭstaris. Ĵa nova, dolĉa, ankoraŭ nekonata sento kaptis ŝin kaj ŝi, aligante larmojn de feliĉo, ĉiam pli kaj pli konfideme alpremis sian kapon al lia larĝa brusto. Ĵpato kvazaŭ tetaniĝis. Li tute ne atendis tian finiĝon, tian kuraĝon de la veninto, ankaŭ tian konduton de la knabino. Lia koro dissiriĝis pro ĵaluzo, pro malamo al la nekonata, kiu venis de ie por rompi lian feliĉon, por deprezi lian solan konsolon kaj celon de la vivo. De alia flanko li estis ankaŭ kortuŝita je la nevidita sceno, kiam la koro de la filino tuj ekonis la patron, kiun ŝi nek konis, nek vidis iam.

— Pardonu... eble, pli frue mi devus ĉion klarigi al vi, sed patra sento superas...- li ekomencis, metinte la manon sur la ŝultron de la knabino kaj kun nekaŝata kompato rigardante Ĵpaton.- Ĉu vi kredas, ke kaj la edzino opiniis ŝin mortinta kaj nur tute okaze ni sciigis pri ŝi... Ho, kion ni travivis dum tiu ĉi tempo! Longe ni serĉis ŝin ĉie, ĉie informiĝis pri ŝi kaj fine... Ŝia patrino memvolis tuj veni ĉi tien por proprokule vidi ŝin kaj tuj... sed ŝi pro la feliĉo, ekviĝinte, ke la filino estas viva kaj sana, malsaniĝis. Ŝia ĝojo estis tro granda, ŝia feliĉo estis senmezura... kaj ŝia organismo ne eltenis, ŝi malsaniĝis. La malsano estas serioza, tiel serioza, ke... se vi iom prokrastos... se vi ne tuj fordonos la knabinon al ŝi, ŝi mortos!... Tiel diris doktoroj... - sur la okuloj de li brilis larmoj.

Ĵpato senhelpe malleviĝis sur la benkon kaj, penante kompreni ion, vagis per la larĝe-malfermitaj malhelaj okuloj tra la ĉambro, kvazaŭ li subite perdis la vidsenton, kvazaŭ li serĉis iun per la rigardo kaj ne povis retrovi. La knabino, kiel antaŭe, sidis senmove, silente, malleviinte la okulojn kaj nenion vidante, nenion aŭdante. Nur ŝia koro batis nekutime-intense en la brusto kaj la belaj, iom paliĝintaj, lipetoj konvulsie tremetis neaŭdeble flustrante la sorĉan, karan kaj tiom nekutiman por ŝi vorton „panjo... mia panjo..."

Neniu interrompis la silenton, ĉiu estis tro okupita de siaj propraj pensoj, impresoj, kiuj estis tiel malsamaj kaj fatalaj por ĉiu el ili kaj promesis al unu en tre proksima estonto feliĉon kaj plenan ruiniĝon, malĝojon al la alia. Tamen la silento premis ĉiun el ili, superis iliajn esperojn, kiuj estis ankaŭ malsamaj kaj je kiuj ĉiu alkroĉiĝis el ĉiuj portoj: la patro soifis tuj ekaŭdi pri la konsento de Ĵpato, Ĵpato siavice deziregis, ke la turmentiga inkaj

ubo, kia ŝajnis al li la tuta afero, malaperu senpostsigne eble plej baldaŭ, se paŭzo danĝero de la minacanta disiĝo, se aperu de ie nekontraŭstarebla helpo, defendo. Kiel antaŭ kuloj de homo, kiu devos tuj neeviteble perei, en unu momento ripetiĝas kun ĉiuj plej sensignifaj detaloj la tuta pasinta vivo, tiel ankaŭ antaŭ Ĵpato ree traglitis nevole komence la longaj jaroj de la senĝoja, senenhava vivo de la soleco, poste malfacilaj, klopodemaj, tamen senfeliĉaj jaroj de la infaneco de la knabino, poste la lastaj jaroj, plenaj de trankvileco kaj interna memkontenteco, mallumigataj de nenio. Li klare rememoris ĉion tion ĉi, ankoraŭ pli klare li prezentis al si senesperan estontecon, se li seniĝos je la knabino. Eksploris subite vento, malgaje, ĝuste kiel tiam - antaŭ dekkvin jaroj, riproĉe eksonis metalsonoj de la telegrafo kaj akra, netolerebla doloro tranĉe ekpikis lian korpon. Li leviĝis, akceptis decidoplenan pozon kaj laŭte, senhezite diris al la generalo:

— Mi ne povas... Tio ĉi estas neebla!

Kian impreson faris tiu ĉi respondo je la generalo kaj je la knabino, ĉu ili silente kaj indiferente akceptis ĝin, ĉu la generalo protestis kaj parolis ion responde, - Ĵpato ne aŭdis, ne memoris. Konsciante, ke li diris nur tion, kion li devis diri, li ree malleviĝis sur la benkon kaj alpremis la kapon al la muro. Li aŭdis nur la telegrafzumadon, kiu vibrante je ĉiuj eblaj manieroj, ŝajne, penis je tiu ĉi fojo nur aprobi lian ripuzon.

XI.

Pri la okazinta iamaniere sciiĝis Filip Vasilič, iamaniere oni venigis en la budon lian edzinon. Kiaj vizaĝoj estis emociitaj. La knabino, kaŝinte sian vizaĝon en la densa barbo de la kaptopatro, silente ploris. Blovis akra vento, je la fenestroj frapis grandguta pluvo, la telegrafo plorĝemis. La laboristoj, antaŭ longe formetintaj la vagoneton de la reloj, nun serĉis ripuĝon de la pluvo ankaŭ en la budo, okupinte lokon apud la pordo mem. La malvasta budo estis plen-plena de la homoj. Iu ekbruligis la lampon. La generalo sidis je la tablo kontraŭ Ĵpato, kiu apatie rigardis siajn maldelikatajn, sulkiĝintajn manojn, kaj per mola voĉo sincertone parolis:

— ... Subite komenciĝis la ribelo en Ĥinujo... Mi aŭdis, ke Eŭropo enmiksiĝas en la afero... Ĉiuminute mi povis atendi, ke jen oni sendos tien min kun la taĉmento. Mi ambaŭ tiecge malĝojis, sed la disiĝo estis neeviteblx. Mi skribis al la patro, petante lin doni en sia domo ripuĝejon al la edzino. Respondo venis baldaŭ. Kvankam el la sekstona letero estis klare, (por ni) ke la patro ankoraŭ kolerus je mi kaj ne povas repaciĝi kun penso, ke mi - liaj sola filo kaj heredonto de la grandega postava bieno - edziĝis kontraŭ lia volo je Luba, kiu al

sortis al mi nek riĉecon, nek eminentan parencaron, tamen ni ne havis alian elekon kaj
pacience toleris tiom pli, ke mi estis tute certa pri tio, ke la patro, ekvidinte Luba'on kaj taksinte
ŝian sagon kaj belecon, baldaŭ ŝangos sian opinion pri ŝi kaj ekamos ŝin, kiel filinon. Efektive, mi ne eraris... Antaŭ mia forveturo al la Oriento mi petegis la ~~sinjoron~~ patron prizorgi
la edzinon dum mia foresto, ankaŭ naskiĝotan idon kaj anstataŭi min. La patro, kompreneble, promesis kaj mi forveturis kun plipaciliĝita animo... Jam reveninte la Orienton,
mi ricevis telegramon de la patro, ke Luba estas serioze malsana, ke doktoroj timigoĉe sendas
ŝin iĉn fremdlanden por sin kuraci, ke la ido naskiĝinta - la knabino, nomita en la bapto Angel-
ina, mortis pro malforteco... Plujn sciigojn mi ne havis de li preskaŭ ĝis la fino mem de la
milito. Dume la edzino ĉiam sin kuracis en Menton kaj senpacience atendis mian revenon tien.
Ha, kiel ŝi bedaŭris, kiel sopiris, ke la senkoruloj sub preteksto de danĝero, kiu, kiel oni asertis,
minacis al ŝia vivo, eĉ unu fojon montris al ŝi la knabinon nek vivan, nek mortinta post
kiam ŝi rekonsciiĝis post profunda sveno, sekvinta la nask procedon!..

Ĉiuj en profunda silento aŭskultis lin kun ĉiam kreskanta scivoleco kaj kortuŝeco. Eĉ
Ipato kvazaŭ forgesis sian malamon al li kaj jam kun kompato fikse rigardis lian emo-
ciitan nobl trajtan vizaĝon.

— En eksterlando, migrante de unu kuracloko al alia, mi pasigis kun ŝi multajn jarojn, — li
daŭrigis post nelonga paŭzo. — Ŝi resaniĝis, fine, kvankam sopirado je la infano, kiun ŝi ĉe
ne vidis, ne donis al ŝi trankvilon kaj, ĉefe, premegis ŝin terura verdikto de kuracistoj, kiuj unu-
voĉe eldiris la opinion, ke plu ŝi ne havos infanojn. Reveninte hejmen, ni baldaŭ sciiĝis pri
morto de la patro, enteriginte kiun, ni restis en la bieno por aranĝi aferojn je ĝia administr-
ado. De tempo al tempo vizitante la tombon de la mortinto, la edzino ekmemoris unufoje,
ke en la sama tombejo devis esti ankaŭ tombeto de ŝia neforgesebla knabineto. Ŝi komencis
serĉi ĝin, sed sensukcese, ĉar neniu povsciis montri ĝin al ŝi. Je la serĉado ekinteresiĝis
ankaŭ mi... kaj jen nur tiam de maljuna tombejgardisto mi je unua fojo ricevis aludon,
ke la filineto ne mortis, ke neniu enterigis ŝin tie... Imagu mian miron kaj ĝojon!.. Ne-
nion dirinte al la edzino, mi komencis serĉposi en paperoj de la mortinto kaj jen unufoje, post longa
kaj atenta esplorado de ĉiaj ŝrankoj kaj kestoj, mi troris flaviĝintajn fragmentojn de lia iama
taglibro... kaj sciiĝis pri unu kruelega, senkora krimo, kies iniciatoro kaj inspirinto estis la
patro... En la taglibro mi tralegis, ke li estis treege malkontenta, ke naskiĝis la nepino,
sed ne nepo, kiun li esperis vidi senpera daŭriganto de sia eminenta kaj glora generacio...
ke pro malamo al Luba, kiu „forlogis" min (kiel estis skribite) kaj „devigis" min edziĝi je
ŝi, li decidis utiligi ŝian malsanon por liberiĝi per unu fojo de la malaminda infano kaj

por venĝi al la bopilino... ke unu servistino, veturonta hejmen, konsentis plenumi tiun ĉi taskon kaj ĵeti ie dum sia vojo la knabinon... ke oni interkonsentis diri al la patrino, ke la infano naskiĝis malforta kaj mortis tuj post la bapto, en kiu oni nomis ŝin Angelina... Kvankam la novaĵo estis konsternanta kaj plej fidinda, tamen mi ne diris eĉ unu vorton al la edzino pri ĝi, la surprizo ja povus mortigi ŝin. Mi decidis, ne perdante tempon, tuj komenci serĉadon, sed, kiel intence, okazis granda malhelpo. La edzino, kiu nenion sciis pri mia eltrovo, eksopiris je la hejmo, je la suda suno kaj postulis tujan revenon. Mi demandis sekrete pri la afero la pastron, servantojn de la domo, sed ĉiuj ili estis novaj loĝantoj de la vilaĝo kaj nenion sciis, nenion aŭdis pri la knabino. Ni forveturis. Longa kaj laciga vojo per ĉevaloj de la bieno, kušinta je sesdek kilometroj de la fervojstacio, devigis nin iom ripozi en la restoracio apud la stacidomo kaj preterlasi unu vagonaron. Tiun ĉi tempon nature mi uzis por demandado kaj serĉado... kaj de unuaj paŝoj mem en tiu ĉi direkto mi atingis tute neatenditan sukceson... mi sciiĝis, ke mia filino estis ĵetita en la stacidomo kaj akceptita de ia bonkora servisto de la fervojo... ke ŝi nun vivas kun li... Mi triumfis kaj jam intencis sciigi la novaĵon al la edzino, sed venkis min prudento. Mi decidis antaŭe konvinkiĝi per miaj propraj okuloj... Sed tempo mankis kaj mi estis devigita interrompi la serĉadon, kiam estis jam trovitaj preskaŭ ĉiuj postsignoj de la perdita filino... Feliĉe, en la vagono mi renkontis mian malnovan kolegon – ĉi tiun fervojestron. Mi ne povis kaŝi de li mian sekreton. Li montriĝis tia korresonema kaj bonsenema, ke promesis al mi tujan sian helpon kaj donis esperon, ke li senprokraste kolektos ĉiujn necesajn sciigojn pri la knabino kaj pri ŝia vivo, se nur ŝi efektive vivas en limoj de la fervojo, administrata de li, kaj rezultatojn sciigos al mi... Ni revenis hejmen kaj je dua aŭ tria tago post la revено mi ricevis la promesitan telegramon. Ŝis tiam inter mi kaj mia edzino estis neniaj sekretoj, ni ordinare ne atentis al kiu estas adresita ia korespondaĵo kaj ofte okazis, ke mi malfermis ŝiajn leterojn kaj ŝi la miajn. Nu, la telegramo venis ĝuste en mia foresto, ŝi tralegis ĝin kaj svenis... La telegramo sciigis: „Via filino estas viva kaj sana. Ŝi loĝas proksime de stacio K. en familio de unu malriĉa, sed bona fervojisto". La edzino malsaniĝis... oni konsilis al mi tuj veturi ĉi tien kaj, se eble, venigi la knabinon... Nu, vi scias, ke mi vizitis vin kaj vidis... Kaj mi ne kašos de vi, de la unua rigardo je la knabino mi eksentis, ke ŝi vere estas mia... ŝia filino, ĉar ŝi estas mirinde simila al... Luba... Jen, vidu mem, mi kunprenis portreton de la edzino!..

La generalo elprenis el flanka poŝo monpaperujon kaj, kun rimarkebla tremado de la mano, silente donis al Ĵpato fotografaĵon.

Tuj ĉiuj sin ĵetis al la tablo kun nekaŝata scivoleco. Ĵpato, leviĝinte de la benko, metis la fotografaĵon al la lampo kaj longe kaj peneme rigardis la portreton, jen alproksimiganta ĝin al la lumo, jen malproksimiganta de ĝi. Ekskuinte per la kapo kaj profunde ekspirinte li ankaŭ si-

lente donis la portreton al Filip Vasiliĉ. Tiu ne rapidante sin armis je okulvitroj kaj longe fikse rigardis la nekonatulinon.

— Mirinda aĵero!.. – li poris nur diri, donante la fotografaĵon al la edzino, kiu ankaŭ iamaniere sen ies helpo alrampis al la tablo kaj delonge senpacience tiris la edzon je maniko. Sed ŝi vidis malbone. Oni serveme metis la lampon al ŝia vizaĝo mem, ne malpli serveme la edzo metis sur ŝian nazon siajn okulvitrojn. Ŝi longe poris nenion ekvidi.

— Ha, kia ĉarma ŝi estas!.. – fine, ekkriis la maljunulino. – Kaj kia simileco... jen la nazo kaj la lipoj estas ĝuste tiaj, kiajn havas nia Angelina!..

La laboristoj, nun ankaŭ starintaj apud la tablo kun seriozaj kaj pensoplenaj mienoj, kun scivoleco rigardis jen la knabinon, jen la portreton kaj per kapskuado esprimis sian miron.

— Du gutoj da akvo ne pli similas unu al la alia, ol la knabino al la sinjorino! – diris unu el ili, metante la portreton sur la tablon kaj reirante al la pordo.

Nur nun, demande ekrigardinte la vizaĝojn de ĉiuj ĉeestintoj, timeme prenis la fotografaĵon en la manojn la knabino. Ĵus ŝi ekrigardis la portreton, larmoj torente ekfluis el ŝiaj okuloj. Ŝi metis ĝin al siaj lipoj, kovris per varmaj kisoj kaj, ekkriinte: „Panjo!.. Mia panjo!" – faligis la kapon sur la tablon.

La generalo, ne deturnante de ŝi sian amplenan rigardon, intense palpebrumis – sur liaj okuloj ankaŭ brilis larmeroj. La maljunulino, sin apoginte je la edzo, senĉese viŝis la okulojn per nazotuko kaj balbutis, sufokante sian ploregon, ion kortuŝan. Ĵpato delikate karesis per la mano la kapon de la ploranta knabino.

— Nu, karaj homoj... – ree komencis la gasto, kiam la aŭskultantoj iom trankviliĝis. – Mi finu la rakonton, nun ĝi estos nelonga... La edzinon mi trovis, kiel antaŭe, malsana. Estas malfacile por mi eldiri al vi, kiel ŝi ĝojis, sciiĝinte, ke mi trovis kaj vidis ŝian filinon – belulinon... kaj kiel ŝi suferis, konsciante, ke ŝi mem ne povas, ne havas fortojn, fari la saman!.. La malsano progresis de tago al tago, ŝi senĉese ripetis la nomon de la filino kaj nokte en febra delirio delikate konversaciis kun ŝi, kvazaŭ ŝi sidis apud ŝia lito... kaj, fine, ŝi sendis min al vi, ke mi petu de vi la filinon, se ne... Se vi ekmemoros, kiom superis tiu ĉi malfeliĉa patrino, trompe senigita je la infaneto tuj post ŝia naskiĝo, neniam vidinta ŝin, neniam karesinta... vi komprenos, ke ŝia deziro estas kontentiginda, ke mi postulas de vi ne troan operon... Mi alte taksas vian kompaton al la jetita, senhelpa infaneto, mi genuiĝas antaŭ viaj kaloplenaj manoj, nutrintaj kaj edukintaj ŝin ne pro ia kontinda profito, sed nur pro amo. Mi dankas Providencon, Kiu metis mian idon al tiaj bonaj homoj... Mi vidas, kiel vi ĉiuj amas ŝin, eĉ pli... Viajn zorgojn pri ŝi, kredu al mi, neniam forgesos mi aŭ la edzino, ni ne kutimis resti nedankemaj!.. Nur, mi ripetas, konsolu la malsanan patrinon! Ŝi benos vin, ŝi rekompencos vin laŭ via plaĉo, ŝi avaros je nenio... ŝi estas

preta fordoni ĉion por felico havi apud si sian filinon!..

Unu momenton en la budo estis strecita silento. Ĉiuj ion atendis responde je la flama parolo de la patro, ĉiuj, šajnis, eĉ kvazaŭ timis laŭte ekspiri, ekmoviĝi sur la loko por ne difekti impreson, faritan de la parolo, por ne rompi solenecon de la fatala minuto. Kaj subite, meze de la silento oni ekaŭdis firman kaj trankvilan, sed ne laŭtan, voĉon de Ĵpato, turnitan al la knabino, kiu ankoraŭ staris apud li, amadmirante la portreton.

— Ĉu vi volas veturi al la panjo?

— Ho, mi volas, tre volas... sed kiel vi restos sola?

— Kion fari?.. Jam, videble, estas tia mia sorto...

— Mi vizitados vin... mi eĉ por unu minuto ne forgesos vin kaj la geavojn... — ŝi diris, delikate ĉirkaŭprenante la kolon de Ĵpato. Kaj post nelonge, sin turnante jam al la generalo, kiu kun batanta koro observis la scenon, ŝi aldonis kuraĝe: — ĉu vi, paĉjo, ne malpermesos al mi tion ĉi?..

Tiu ĉi „paĉjo", je unua fojo dirita de la filino, tiel impresis je la feliĉa generalo, ke li tuj, tute forgesinte pri sia alta rango, alkuris al ŝi, sidiĝis apud Ĵpato mem kaj, karesante la knabinon, diris:

— Jes, mi neniam malpermesos!.. Mi mem kunvi kaj la panjo vizitados tiun ĉi bonan, neforgeseblan onklon Ĵpaton!

La manetoj de la knabino forlasis la maldikan, vejnoplenan, sunbruligitan kolon de Ĵpato kaj je unua fojo ĉirkaŭvolvis la kolon de la patro. EkSonis varma kiso kaj Ĵpato tuj eksentis akzon doloron, kvazaŭ io deširiĝis de lia koro.

XII.

Nur post la noktomezo la feliĉa patro forlasis la budon. La tempo estis pasigita en vigla priparolado de la afero. Kvankam la geavoj estis surprizitaj, ekaŭdinte la subitan konsenton de Ĵpato je la disiĝo, kvankam la disiĝo estis doloriga ankaŭ por ili, ili ne protestis, decidinte, ke Ĵpato kaj sole li, kiu akceptis kaj edukis la senhejmulinon, rajtas disponi ŝin. La generalo ne volis prokrasti eĉ unu horon kaj rapidis sciigi al la edzino la ĝojon kaj prepari ŝin al venonta renkontiĝo kun la filino. Tuja disiĝo estus tro malfacila ankaŭ por la koroj, kiuj tiel amis ŝin, tial oni decidis, ke Angelina veturos post unu tago, akompanata de la baptopatro, ĉar Ĵpato ne povis sen speciala permeso foriĝi de la posteno por tiom malproksima vojaĝo. Por plegi la maljunulinon oni decidis inviti ŝian filinon. La generalo restigis supičan monon por vojelspezoj kaj promesis, ke venos por la vojaĝontoj la sama vagoneto, ĉar li ne volis, ke la maljunulo kun la knabino piediru ĝis la stacio.

Antaŭ tagmezo de la tago fiksita Angelina kaj Filip Vasiliĉ jam estis tute pretaj por la vojaĝo. La knabino, vestita je unu el siaj plej bonaj vestaĵoj, senĉese ekkuradis el la budo, fikse ri-

XIX

gardis antaŭen kaj atente aŭskultis, senpacience atendante venon de la promesita vagoneto. Filip Vasilič grave paŝetis tra la ĉambro, donante de tempo al tempo lastajn ordonojn kaj konsilojn al la filino kaj, ŝajne, jam je mila fojo pacience aŭskultante rememorigadon de la edzino, ke li dum la vojaĝo eĉ je unu paŝo ne foriru de la knabino, ke li sin gardu kontraŭ poŝŝtelistoj kaj neniadiaze restigu la knabinon, se la gepatroj renkontos ŝin ne sufiĉe amike, aŭ se ilia vivo ne plaĉos al ŝi. Ĵpato sidis hejme silente kaj zorgatakite-atente trarigardis engranda saxo „doton" de la knabino - modestajn vestaĵojn, helkolorajn kaptukojn, viŝtukojn, broditajn de ŝi mem, kaj rulandojn por harligo, timante, ke, pro tro rapida preparado, ne estu forgesita io, laŭ lia opinio, valora kaj necesa por la knabino.

La pordo ekkrakis. Enkuris Angelina gaja, feliĉa.

— La vagoneto alproksimiĝas!.. — ŝi vigle ekkriis. — Kie estas la baptopatro? Mi tuj diros al li.

Kaj ŝi jam rapidege turniĝis por ekkuri, kiam Filip Vasilič mem aperis en la ĉambro.

— Pli baldaŭ, pli baldaŭ!.. Ni malfruiĝos al la vagonaro! — ŝi ekkriis, svingante per la manoj. — La vagoneto jam estas proksime.

— Antaŭe iru kaj petu benon de la baptopatrino... — serioztone tiu respondis. — Adiaŭu kun ĉiuj, kiu scias — eble vi ne vidos plu...

La knabino forkuris, anstataŭ ŝi en la ĉambron eniris vagonetkondukistoj. Baldaŭ venis kun postplora vizaĝo la filino de Filip Vasilič kaj post nelonge revenis ankaŭ Angelina. Ŝi tenis en la manoj negrandan ikoneton - la benon de la baptopatrino. Ŝajeco jam senpostsigne malaperis de ŝia vizaĝeto, ŝi mordpremis la supran lipeton, penante sin deteni de ploro.

Ĵpato prenis de la muro la ikonon, viŝis degi polvon per pura viŝtuko kaj, alproksimiĝinte al la knabino, komencis kortuŝe per emociplena voĉo:

— Mi benas vin, mia karulino, per tiu sankta ikono...

— Genuiĝu, genuiĝu!.. — eksplustris la onklino.

La knabino tuj genuiĝis, malleviute la kapon.

— Mi benas vin, mia infano, al la nova vivo per tiu sama ikono, antaŭ kiu mi preĝis, ki- am vi estis eta infano, antaŭ kiu mi instruis vin preĝi, antaŭ kiu mi elveršis al la Sinjoro miajn ĝojojn kaj malĝojojn. Ke Li gardu vin kontraŭ ĉia malbono kaj konservu... Ne forgesu Lin, preĝu!.. Li ankaŭ ne forlasos vin dum malfacilaj minutoj, neeviteblaj en nuna vivo!.. Ne forgesu ankaŭ... min...

Li finis. Larmoj staris en liaj bonaj maljunulaj okuloj. Per la manoj tremantaj li trifoje faris krucosignon per la ikono super la kapo klinita de la knabino.

Poste same benis la knabinon per alia ikoneto la baptopatro. Poste ili ĉiuj preĝis kaj komenciĝis adiaŭo. Ĉiuj laŭte ploris, kisante unu la alian, kaj la knabino ploregis, lastfoje

ĉirkaŭprenante Ipaton.

Oni metis en la vagoneton vojsakojn, sidiĝis la knabinon kaj post ĉiuj vigle eniris ĝin Filip Vasilič. La vagonetkondukistoj ekturnis la tenilon, ekpuŝis la radoj, la vagoneto ekmoviĝis, ĉiam plirapidigante sian kuradon. Baldaŭ ĝi estis jam malproksime, apenaŭ estis videbla blanka tuketo, per kiu la knabino senĉese svingis adiaŭe, baldaŭ ĉio malaperis el la okuloj, sed Ipato ĉiam ankoraŭ staris senmove sur la sama loko kaj, kiel antaŭe, fikse rigardis en spacon.

— Adiaŭ, onklo Ipato, mi kuros al la patrino... vizitu nin...— diris la filino de Filip Vasilič kaj malrapide foriris hejmen, survoje višante la malsekajn okulojn.

Ipato restis sola. Ĵom da tempo li sidis sur la benko kontraŭ la budo, sed ekblovinta vento igis lin foriri hejmen. En la budo, jus li eniris en ĝin, ekblovis je li nekutima malpleneco kaj tombeja silento. Li balais la plankon, kolektis kaj kunligis en granda sako ĉiutagajn restaĵojn kaj ŝuojn, restintajn post la knabino, metis la sakon sub benkon kaj enpensiĝis. Lin premegis sopiro, izoleco kaj silento. Li provis pregi, sed ne povis — liaj pensoj estis nekoncentrigeblaj. Malgaje li sidiĝis kaj, kunmetinte sur la brusto la manojn, malleviš la kapon. Se simila humoro okazus al li antaŭe, antaŭ du-tri tagoj, li genuiĝus antaŭ la ikono kaj petus la knabinon legi akafiston, aŭ li aŭskultus ŝian nekompareblan kaj neniam enuigan legadon de biografioj de sanktuloj, aŭ, fine, li irus al Filip Vasilič kaj tie forgesus sian sopiron en ia animsaviga pia konversacio, sed nun nek tio, nek la alia estis ebla.

— He, ili ĉiuj lasis min sola !... — li diris malgaje kaj enlitiĝis.

Longe li ne povis ekdormi, longe malgajaj pensoj neforpeleble premegis lin, fine, la antaŭa sendorme-pasigita nokto montris sian influon kaj en la budo ekaŭdiĝis laŭta egalmezura spirado de la dormanto, interrompata de tempo al tempo de ankoraŭ pli laŭta ronkado.

Ju facile ekpuŝis je la pordo. Ipato ekstremis kaj malfermis la okulojn: en la ĉambro estis mallume. La ekpuŝo ripetiĝis. Li saltleviĝis de sia malmola kuŝejo, ekbruligis la lampon kaj, malfermante la pordon, enlasis blankbarban maljunulon.

— Ĉu vi jam dormas? — demandis la enirinto, apable ridetante. — Kial vi tiel fikse rigardas min, ĉu vi ne rekonis min?

— Mi rekonis, mi tuj rekonis vin, avo Anton, — subite gaje ekparolis Ipato. — Senvestiĝu, sidiĝu, ripozu... Vi venis ĝustatempe. Dio mem sendis vin hodiaŭ al mi. Mi tute pereas pro sopiro, mi ja orfiĝis... La filino... mia knabino...

— Ĉu io okazis? — kun miro demandis la avo, malrapide senvestiĝante kaj pendig-

ante siajn restaĵojn. – Ho, Sinjoro!... Tamen vi, ŝajne, jam ploras?.. Nu, rakontu, rakontu, kio okazis?..

Kaj Ĵpato tuj, ĝojiĝinte je la neatendita gasto, komencis sian longan rakonton pri la okazinta. La blankbarbulo atente aŭskultis lin, formetante de la piedoj siajn multepezajn ledbotojn kaj vestante anstataŭ ili vastajn kaj molajn feltbotojn de la mastro.

Li estis unu el tiuj pilgrimantoj, kiuj iafoje viziti Ĵpaton kaj kies rakontojn li tiel ŝatis. Vivo Anton estis saĝa maljunulo, kiu dum sia vivo multan vidis, multan spertis kaj liaj konsiloj ĉiam estis prudentaj kaj ĝustaj. Vizitante sanktajn lokojn, li laŭlonge kaj laŭlarĝe trairis tutan Rusujon, eĉ dufoje Dio indigis lin viziti la Sanktan Landon.

– Ĉu vi finis, mia animo?- la pilgrimanto demandis, levigante de tetrinkado, dum kiu li eldiris neniun vorton, jus Ĵpato kun nerva tremo de voĉo finis sian rakonton pri la disiĝo kaj silentiĝis. – Do kial sopiri, kial tiel malĝoji?..

Ĵpato kun mizo ekrigardis la gaston.

– Vi ja deceptenemis vian taskon, via konscienco ja estas trankvila, – li daŭrigis per entuziasmoplena voĉo, – do vi ĝoju kaj danku Dion, Kiu helpis al vi. Pripensu bone la aferon, kio nun mankas al vi: la knabinon vi kreskigis per viaj propraj manoj, instruis ŝin je ĉio bona, altmorala kaj, ĉefe, vi ne forgesu tion, vi mem nerimarkeble, edukante ŝin, edukis ankaŭ vin mem, forĵetinte multajn viajn antaŭajn malkonajn kaj animpereigajn kutimojn kaj perfektiĝis spirite... Ĉu oni povas malĝoji je tio ĉi?.. He, he, he! Tro mempidaj kaj memamaj estas ĉiuj ni surteranoj! Jen kie estas sekreto!.. Ni tre ŝatas niajn virtojn, trograndigas niajn meritojn... kaj, jus fortuno turnos al ni sian dorson, ni jam perdis tutan nian kuraĝon, jam mallevis nian kapon... Sed vi, mia animo, rigardu la aferon alie, kristane. Neniu disputos pri tio, mi scias, multajn zorgojn, mizerojn kaj malĝojojn vi toleris, kreskigante la knabinon, sed ĉu ne Dio donis ŝin por tio al vi, ha?.. Nu, se tiel, se Li donis, ĉu Li ne povis preni ŝin reen? Ĉu pli facile estus por vi, se ŝi mortus, – kaj en tio ĉi estus nenio miriga, neordinara. Ni vidas, ke sufiĉe mortas, kiel muŝoj aŭtune... Ni parolas pri tiuj infanoj, kiuj estas vartataj kaj mamnutrataj de patrinoj, kaj la via ne sciis eĉ tion... Jen, mia animo, konsolu vin tiamaniere kaj rezonadu, kiel pia Jobo: „Dio donis, Dio ankaŭ reprenis! Estu benata Lia sankta nomo!..“ Nia intelekto estas tro neperfekta, tro limigita, ĝi neniam komprenos, neniam divenos Lian saĝegan Providencon, Liajn misterajn vojojn, per kiuj Li kondukas nin al bono, al nia propra bono! Vi bezonis je morala pliboniĝo, perfektiĝo, Dio donis al vi la knabinon, dank'al kiu vi akiris kun Lia helpo tion kaj la alian. Se Li nun reprenis ŝin de vi, tio signifas, mia animo, ke ŝi nun fariĝis superflua por vi, plu ne bezona por vi, ankaŭ

ĵi por ŝi... Tio signifas, ke vi ĝuste plenumis vian unuan destinon, ke nun la Sinjoro montras al vi alian, pluan vojon al la savo. Rigardu, vi jam estas maljuna, vi jam ne havas antaŭan forton kaj sanecon, tamen, se Dio ne reprenus de vi la knabinon, vi devus ja ĝis via morto mem senelire vivi en via budo por havi necesan perlaborajon... Kaj propria opi c servo vi estis senigita je ebla vizitadi Lian sanktan templon, kio estas tiom necesa por animsavo... Nu, liberiginte vin de zorgoj pri ŝi, Dio, eble, montras al vi, ke nun estas ĝustatempe por vi forlasi la servon kaj servi al ~~Dio~~ Li alimaniere... Antaŭe vi estis kunligita, malliberа, — nun vi povas fari, kion vi volas, neniu ĝenos vin, neniu malhelpos... Kion vi bezonas?.. Kenion, nur vojbastonon kaj panpecon. La unuan vi trovos sen peno en arbaro kaj la alian ĉiam donos al vi kristanamantoj... ili, dank' al Dio, neniam mankis en nia lando... Ankaŭ tion pripensu, mia animo: Dio senigis la gepatrojn de la knabino je feliĉo eduki ŝin, ami kaj karesi. Ĉu ne signifas tio, ke Dio antaŭvidis, ke ili ne porscios eduki ŝin dece, kiel vi?.. Kaj nun, kiam ŝi profunde enradikigis en sia animo kaj koro bonan komencon de la kristana religio, ne estas danĝeraj por ŝi eĉ delogoj, kiujn ŝi vidus en grandmondo, en la familio... kio antaŭe estus por ŝi pereiga. Neniu scias saĝegajn vojojn de Dio... Eble, Li volas, ke ŝi nun influu eĉ la gepatrojn kaj konvertu ilin de pereiga vojo, sur kiu ili staras!.. Jen, mia animo, ne sopiru plu, sed ĝoju je Dio... Mi scias, vi amis ŝin... nu, tio antaŭe estis necesa, nun amos ŝin la gepatroj... Via antaŭa amo jam estos superflua nun, ne bezona... Ŝi bezonos nun nur je viaj preĝoj! Jen, mia animo, kiel ni devas ĝuste, kristane rigardi la aferon...

Kaj longe, longe ankoraŭ similmaniere edifis la pilgrimanto Ĵpaton. Antaŭlonge ili finis la vespermanĝon kaj kuŝiĝis sur la varman fornegon, antaŭlonge koko en bovinstalo de la kaptano kantis, sciigante, ke venis la noktomezo, jam preterkuris la budon, brueganto kaj skuante la teron, tri aŭ kvar ŝarĝvagonaroj, sed el la buŝo de la pilgrimanto ankoraŭ, kiel antaŭe, flustre fluis, kiel el sanига fonto, saĝega parolo, kiu penetris ĝis la koro mem de Ĵpato, konsolante, plifaciligante kaj ĝojigante ĝin.

XIII.

Matene Ĵpato vekiĝis vigla kaj trankvila. De la antaŭa malĝojo kaj sopirado ne restis eĉ eta postsigno. Kun profunda riverenco kaj bondeziroj li akompanis la malserena junulon el la budo kaj kun luma, facila animo iris por kutima matena esplorado de la vivejo.

Antaŭe tiu ĉi tasko ŝajnis al li enuiga kaj postulinta grandan strečitecon de atento kaj portoj, je tiu ĉi pojo ĝi ŝajnis al li facila, agrabla promeno. Li finis la esploradon, sidis dum

elkaj minutoj sur rando de kruta pervoja sursûtajo kaj jam komencis pensi pri revено hejmen, ki-
m subite li ekridis je io, leviĝis kaj rapidеme ekpaŝis laûlonge de la reloj ne hejmen, sed en tute
ntraŭa direkto – al la stacidomo. Ĵrante li senĉese ridetis feliĉe, mangestis kaj duonvoĉe
aje interparolis kun si mem.

En la stacidomo li tuj vizitis la staciestron.

– Ha, Ĵpato!.. – tiu ekkriis afable, jus la maljunulo eniris en la dejorĉambron. – Kia feliĉo falis
ur vian kapon!.. Mi aŭdis, la generalo estas riĉeg-eg-a...

– Via moŝto, – Ĵpato interrompis lin, – eksigu min, mi petas!.. Mi jam estas maljuna, mi serv-
s supiĉe, ke servu nun iu pli juna...

– Vi parolu la veron, mi scias, ne la maljuneco, sed la neatendita riĉeco instigas vin al tio... Nu,
iom da monoŝutis al vi la bonfaranto? Ĉu unu milon da rubloj? Vi parolas...

Ĵpato silentis. La staciestro longe ankoraŭ moketis je li, enviante, tamen plenumis lian peton
aj ordonis transdoni la tutan havaĵon de la fervojo, kiun li havis en la budo, al nova juna gard-
isto, venonta vespere.

– Bonan vesperon, kapitanino! – gaje ridante, parolis vespere Ĵpato, enirinte en la domon de
a kapitano kun sako, kiuj enhavis lian mizeran havaĵon. – Ĉu vi sopiras je sia maljunulo?..

– Ho, mi sopiras, karulo, mi sopiras... Ĉu mi povas ne sopiri? Dum la tuta vivo ni neniam disiĝis
or tia longa tempo... Mi tre kredaŭras lin, la vojo estas tre longa, laciga... tute elturmentiĝ-
s mia maljunulo, sed ĉefe... ĉefe, mi sopiras je la knabino... Mi ploras senĉese pri ŝi... Jam plu
e enkuros ŝi, kiel antaŭe, ne eksonos plu ŝia voĉeto sonora... – la maljunulino eksploris. – Ne,
i, kapitano, kiel fartas?.. Ĉu vi ankaŭ ploras senĉese? Sidiĝu, estu gasto... Ne opte ja ni inter-
idiĝas...

– Ne!.. – gaje ekskuinte per la kapo, respondis Ĵpato. – Mi ne sopiras! Kion fari? Dio donis ŝin
l mi, Dio ankaŭ reprenis, estu Lia sankta volo!.. Mi, kapitanino, venis al vi ne gasti, sed logi,
ne rifuziĝu akcepti min ĝis la revено de la kapitano. Mi hodiaŭ eksiĝis kaj ne ~~volas~~ havas plu
ejmon. Nu, mia kunĉeestado, mi esperas, ne tro ŝarĝos vin, eble, kun mi vi pli facile toleros la dis-
iĝon...

Kaj ekloĝis Ĵpato ĉe la kapitanino. Kaj miras ŝi, rigardante lian viglecon kaj gajecon neordinarajn
aj ne povas kompreni kaŭzon de ili. Ankaŭ la subita eksiĝo ne malmultе mirigis ŝin, tamen ŝi
e kuraĝis demandi lin pri tio, esperante, ke, kiam revenos la edzo, li mem ĉion rakontos al ili.
ektive, kune kun Ĵpato estis pli facile pasigadi longajn, lacigajn tagojn de la atendado de
a edzo, kiu ial tro longe ne revenis. Se ĉiam ne estus apud ŝi gaja Ĵpato, la maljunulino mort-
s pro sopirado kaj malespero. Memfare, pasis jam unu semajno, estis proksima fino de
a alia, kaj Filip Vasilič ne revenis; kvazaŭ li malaperis senpostsigne. Pasis tago post tago en

turmentiga, strečita atendado, en diversaj eblaj kaj neeblaj supozoj paraltaj. La maljunulino dum nokto j vidis malbonajn songôjn, - vere, ŝi mortus, se ne estus apud ŝi Ĵpato.

Sed nenio malbona okazis al Filip Vasilič. Li trepeliče plenumis sian taskon - prezentis la knabinon al la gepatroj, gastis če ili, kiel plej kara parenca homo, tutan semajnon kaj, ekvidinte, ke la knabino trovis feličon neniam songôitan, restigis ŝin. Je la dekkvina tago post la disigô li revenis la stacion. Estis malgrua vespero kaj li proxrastis revenon hejmen, decidinte pasigi la noxton en la familio de la bopilo. Estis neeble preteriri la parencojn ne sciiginte ilin pri tio, kia feličo falis sur kapon de la knabino, kian gastamecon kaj amon, ĝis tiam ne viditajn, li trovis por si en sinjora domo de la generalo. Nur matene de la tago sekvinta, post xutima tetrinkado kaj matenmanĝo, li ekpaŝis malpacience al la hejmo.

Ju pli proksima estis la hejmo, ju pli baldaŭa fariĝis ĝojo de kunvidiĝo, des pli kreskis malpacienco de Filip Vasilič, des pli malgacila estis por liaj maljunaj piedoj la paŝado. Jam restis nur duonverstо, post kelkaj paŝoj estos videbla la budo de Ĵpato kaj la domo, sed sako post la dorso netolereble premis kaj granda korbo en la manoj, kiu en komenco ne ĝenis al li gacila, dolorige eltiris liajn manojn. Li haltis por unu minuto, viŝis per tuko ŝvitan de la vizaĝo kaj kve, per pli rapidaj paŝoj, ekiris. Jen estas la budo kaj la domo, mallarĝa strieto da fumo leviĝas al nubo j el la kamentubo, - gloro al tio, la hejmo estas tute proksima, nur je kelkaj paŝoj. Ekbruegis alproksimiĝanta pasaĝera vagonaro, elkuris el la budo Ĵpato, etendis la manon kun la signalflageto. Rigardas lin la maljunulo kaj la koro ĝoje batas en lia brusto, kvazaŭ ĝi volas elsalti por proĝojo. Li jam ne paŝas rapideme, kiel antaŭe, li jam kuras por pli baldaŭ cirkaŭpreni la kaptanon. La vagonaro rapidege preterkuris, cirkaŭblovinte lin per varma, naftodoranta malseka vaporo, li kuras kaj vidas, ke Ĵpato... sed tiu ne estas Ĵpato, sed iu nekonata. „Sinjoro, - pensas la maljunulo, - do kie estas Ĵpato? Ĉu io malbona okazis al li? Ĉu li mortis, malsaniĝis pro la disiĝo?.."

— He, bonan tagon! - li kriias, penante haltigi la nekonatulon, kiu rapidas en la budon.

— Bonan tagon, - tiu ankaŭ respondas, haltante kaj kun scivoleco rigardante la šargitan, ŝvitkovritan piedirantоn.

— Sed kie estas la kaptano?.. Kio okazis al li?..

— Kia kaptano?..

— Nu, tiu Ĵpato, kiu...

— Mi ne scias... Kaj vi kiu estas?

— Mi estas la posedanto de jen tiu domo... — jam ne volonte, zorgatakite respondas la maljunulo kaj rapidas plu en. Kaj en lia kapo zumas maltrankvilaj pensoj kaj supozoj pri la kaptano.

Fl

non k

filizn

de la

– Ne

čirka

– M

– Tio

Anke

– Su

Ku

to ka

senfi

pelič

kump

aven

—..

zoriz

ojos

ori k

oli b

esos

i pos

la s

re k

Vorz

Se

iam

do,

apt

nat

coj

an

j. P

Flustrante preĝon, li transpaŝis la sojlon, senbrue formetis sur la planxon la ŝarĝon, faris krucosignon kaj per neaŭdeblaj paŝoj eniris la ĉambron de la edzino. Kia ĝojo! Ĉiuj - la edzino, Ĵpato kaj la filino - estas tie. Ekaŭdiĝis ekkriој de miro, ĝojo, eksonis varmaj kisoj, ekbrilis la okuloj pro feliĉo de la kunvidiĝo.

– Nu, kaptano, – parolas Filip Vasilič, – via filino ordonis saluti vin, kisi... Ne sopiru je ŝi, ŝi estas ĉirkaŭita de neelparolebla feliĉo kaj amo...

– Mi neniom sopiras! – gaje respondas Ĵpato. – Kial sopiri? Dio donis ŝin al mi, ankaŭ Dio...

– Tio ĉi estas ĝusta, kaptano... Tamen mi supozis, ke vi turmentiĝas pro la disiĝo, eĉ kvas...

Ankaŭ la knabino supozis la saman, senĉese rememorante vin...

– Suprče, kaptano, pri la kagateloj! Rakontu, kiel oni renkontis vin, kiel ŝi restis...

Kun miro ekrigardis Filip Vasilič la enigmoplene-feličan kaj trankvilan vizaĝon de Ĵpato kaj tamen nenion diris al li, nur facile ekskuis la ŝultrojn. Kaj el lia buŝo tuj ekfluis longa, senfina rakontado. Oni senĉese interrompis lin per entuziasmaj ekkriој de miro, ravo kaj ĝojo, feličaj larmoj ne sekiĝis sur iliaj ne malpoli feliče-kontentaj, trankvilaj vizaĝoj, kiam li, kun propra, ŝajne, al sola li vireco kaj allogeco, detale kaj elokvente priskribis siajn neforgeseblajn aventurojn, impresojn kaj sentojn.

– ... La ĉambroj estas luksegaj, ĉie - geservistoj, lakeoj servemaj... Kaj la sinjorino estas tia bona animo, ke mi ne povas eĉ kompari ŝin kun iu. „Se vi enuos pri la knabino, venu ĉi tien ĉiuj, ni trovos kaj la filino pli baldaŭ trankviliĝos, alkutimiĝos al la nekutima medio", – ŝi parolis. Sed ĉiri kio ajn ŝi ekparolus, ŝi nepre nevole en siaj pensoj transportiĝis al vi, kaptano... „Ke li venu pli baldaŭ al ni, – ŝi parolis, – mi deziregas vidi lin... Ni mem plegos lin ĝis lia morto mem, karesos, kiel li vartis kaj karesis mian ĉarman knabinon!.." Multe da mono ŝi sendis... sed pri tio ŝi poste... Tia ĝojo, tia feliĉo, kaptano!.. Ok tagojn mi pasigis en la domo, oni ne lasis min... La sinjorino mem kondukis min tra la ĉambroj, montris al mi mirindaĵojn... Manĝis mi kune kun la gesinjoroj, lakeoj staris post mia dorso, servante al mi ankaŭ, kiel al ia sinjoro... Dormis mi en sinjora lanuga lito... Vere paradizo!..

Sed miro kaj surprizo de ĉiuj atingis plej altan gradon, kiam la maljunulo enportis en la ĉambron la sakon kaj korbon. Ĵus li malligis la sakon, oni ĉirkaŭis ĝin kaj, kun detenata spirado, eĉ ne povis diri ion. Ŝi estis plena da valoraj donacoj kaj memoraĵoj pri la knabino. Luksaj aptukoj, kunvolvaĵoj da katuno, ŝtofoj plenigis la sakon. La maljunulo laŭvice elprenis malrapide unu donacon post la alia kaj klarigis ilian destinon. Por ĉiuj estis konvenaj donacoj, neniun forgesis la bona sinjorino. Kompreneble, pli valorajn donacojn ricevis la geavoj, kaj tamen ilia filino kun la edzo kaj ĉiuj iliaj infanoj estis ankaŭ abunde provizitaj je donacoj. Post ĉio la avo elprenis de la fundo mem de la sako dikan novan grandlitere - presitan

mal Komprenijo ?

Ebl. : ne Komprenu

psalmolibron kaj, respektege kisinte ĝin, metis sur breton apud la ikonoj. La knabino mem donacis ĝin al la kaptopatro, kiu tre ŝatis tiun ĉi libron. Sola Ĵpato ricevis nenion.

— Ne malĝoju, kaptano, — konsolis lin la mastro, — oni intence sendis nenion al vi, ke vi mem pli baldaŭ venu tien kaj propramane ricevu indan rekompencon por ĉiuj viaj zorgoj, klopodoj.

Sed Ĵpato kvazaŭ tute ne rimarkis, ke oni forgesis pri li. Li ĝojis pli ol ĉiuj, vidante kian ĝojon kaj plezuron al ĉiuj liveris li pro sia multjara sindonemeco al la knabino.

Poste oni malligis la korbon. Ĝi estis plen-plena da sinjoraj manĝaĵoj: kolbasoj, fiŝoj, fruktoj plenigis ĝin ĝis la randoj mem.

— Kaj nun, kaptano, — diris Filip Vasilič, malligante la zonon kaj elprenante el la surbrustaĵo monujon, — vi ricevu la monon. Ducent rublojn sendis la sinjorino por viaj bezonoj kaj vojelspezoj.

Neniam tia monsumo estis en la manoj de Ĵpato. Li penege kalkulis la monon, ion konsideris dum unu minuto kaj, redonante al la kaptano la duonon, diris:

— Ŝuĉe por mi, kaptano!.. Prenu, vi ja havas la familion, genepojn...

XIV.

Kvar noktojn kaj tri tagojn pasigis Ĵpato en vagonaro pli frue, ol atingis la celegon. Kun diversaj embarasoj, nur post longa vagado tra bruaj, nekonataj stratoj kaj trudema demandado de indiferentaj kaj neparolemaj pretervirantoj, fine, li trovis luksan masonitan domon de la generalo. Servosoldato, kiu malfermis la pordon, longe kun mizo kaj malkomprenĝo rigardis lian pli ol modestan vestaĵon kaj ankoraŭ pli longe ne povis kompreni, kion celonis la maljunulo.

— Al sinjoro generalo... al lia moŝto generala... Mia knabino Angelina estas lia filino... malkuraĝe balbutis Ĵpato, konfuzita de severa mieno kaj maljentileco de la nekomprenema servisto.

Fine, oni enlasis lin en la vestiblon. Juna lakeo, en molaj ŝuoj kaj blankaj gantoj, akceptis lin tie, stis, videble, pli komprenema. Li de unua vorto de Ĵpato komprenis la aferon, ĝentile sidigis in sur kanapon kaj, kiel sago, malaperis, senbrue glitante laŭ molaj tapiŝoj. Ĵpato atendis e longe. Baldaŭ lian akrasentan orelon atingis sonata sonora knabinvoĉo. Kaj pli frue, ol li ovis ankoraŭ ion konsideri, li ekscentis, kiel lakonataj manetoj ĉirkaŭvolvis lian kolon. La nabino estis nerekonebla en sia luksa punta vestaĵo kaj moda hararanĝo super la alta frunō, kiun antaŭe ŝirmis densaj bukloj. Ŝi estis ĉarma kaj bela, kiel unua maja floro kaj agrabla parfumodoro eliĝis el sennombraj faldetoj de la vestaĵo, aldonante tiun ĉi similecon. Lakeo ekveme kaj singarde, kvazaŭ timante per ia sia nelerta movo maltrankviligi aŭ ĝeni la

ne: Rutine sed i
nsenkom prenebuli

gaston, formetis de Ĵpato polvroxorritan palton kaj lia knabino, lumigita de felicô kaj ĝojo, kondukis lin tra ĉambraro al la patrino.

Ses tagojn, kiel en sonĝo, pasigis Ĵpato en la familio de la generalo. Kvankam nenio mankis tie al li, kvankam oni rilatis al li plej amike, plej parence, li ekkonsciis je kamparo, je bruantaj arbaroj, meze de kiuj li naskiĝis kaj pasigis sian vivon. Li malkaŝe sciigis al la sinjorino pri sia soifo, pri sia intenco pilgrimi kaj petis, ke oni ne detenu lin. Oni aĉetis por Ĵpato novajn botojn, longan pilgrimrestaĵon, similan al tiu de monaĥoj kaj ledan sakon, provizis lin je tolaĵoj, manĝaĵoj kaj mono. Oni kore adiaŭis kun li, la knabino, kutime, ploris. La sinjorino petis persiste, ke li vizitu ilin kaj ne forgesu.

Tutan semajnon post tio Ĵpato pasigis ankoraŭ en la urbo, vizitante ticajn preĝejojn kaj monaĥejojn kaj senfine explaĉis al li solenaj diservoj, kiujn malofte li ĉeestis antaŭe, kaj tutkore li dankis la Sinjoron, Kiu montris al li la savigan vojon. En la lasta tago de sia estado en la urbo li konatiĝis kun unu pilgrimanto, kiu piedire migris en Kovan Jerusalemon[x)], kaj petis lin Ĵpato, ke li permesu akompani lin. Ili ekiris kune kaj poste, migrante de unu sankta loko al la alia, jam ne disiĝis ĝis morto mem de la pilgrimanto.

Senĉese laŭdante Dion, Ĵpato jen kun akompanantoj, jen sola vizitis Solovki-on[xx)], Valaám-on kaj je la tria jaro de sia pilgrimado entreprenis, fine, longan vojaĝon en malproksiman Sanktan Landon, kien delonge jam logis lin lia koro.

Kiel decis, li venis tien ĝuste antaŭ Pasko kaj indiĝis renkonti la feston apud la ĉerko de la Sinjoro. Neniun sanktan lokon, tiel aŭ alie kunligitan kun la surtera vivo de Kristo, li preterlasis, ĉie pentante, preĝante pri bonfaremuloj kaj, ĉefe, pri la knabino. Ĉu nekutima returna marvojaĝo laciga tiel influis lin, ĉu kaŭzo de tio estis lia kaduka aĝo, li revenis en la parencan landon malsaneta kaj senfortiĝinta. Oni proponis al li ankoraŭ vojaĝi al Bazi[xxx)] por riverenci al tiea fama sanktulo, sed li rifuziĝis, kvankam la propono estis tre alloga: io nekomprenebla nun nevenkeble logis lin en la urbon por ekvidi ankoraŭ unufoje la knabinon. Kaj post longa piedirado li, fine, atingis la celon.

Kun li ne devis longe klariĝi al pordisto, kiu li estas kaj kion li deziras, oni enlasis lin en malhelpe. Tuj, kiel antaŭe, oni sidigis lin kaj raportis al la gesinjoroj. Kiel antaŭe, kuris al li en la vestiblon la knabino; kiel antaŭe, ŝi afable kaj ĝoje renkontis lin, ĉirkaŭprenante kaj superŝutante per kisoj. Kvankam de unua rigardo Ĵpato estis nerekonebla en sia malpura flikita vestaĵo kaj truhavaj botoj, kvankam lia barbo kaj longaj haroj tute griziĝis, ia koro tuj ĝoje ekbatis, ĵus ŝi ĵetis al li sian rigardon. Sed Ĵpato neniam rekonus ŝin, se ĉe aliaj kondiĉoj renkontus ie aliloke sian antaŭan etulinon - „filinon". Nek ŝia aspek-

---

x) Monaĥejo proksime de Moskva, en kiu Patriarko Nikon konstruis multajn preĝejojn kaj cet., tre similajn je tiuj de Jerusalemo. xx) Fama rusa monaĥejo en la Blanka maro. xxx) Urbo en Ŝtatujo, en kiuj estas sanktaj restaĵoj de S. Nikolao, kiun tre ardoras rusaj kristanoj.

ĵo, nek teniĝo, nek, fine, parolmaniero estis antaŭaj; la antaŭa restis nur boneco kaj kortuŝa amo al li-maljunulo.

Je tiu ĉi fojo la tuta familio akceptis Ĵpaton kun ia neordinara, neklarigebla ĝojo. Longe miris Ĵpato, kion ĝi povus signifi, nur vespere de unu tago, kiam la belvestita knabino enkondukis lin je la mano en lukse meblitan kaj lumigitan gastoĉambron, ĉio klariĝis.

— Jen, ano Ĵpato, estas la fianĉo de via „filino", - diris la generaledzino, prezentante al li belstaturan, altkreskan junan oficiron, - ili fianĉiĝis delonge, delonge ili geedziĝus, se la knabino ne prokrastus ĉiam de tago al tago la geedziĝon, antaŭsentante vian baldaŭan revenon kaj ne dezirante fari tian pašon sen via konsento kaj beno. Ĉu plačas al vi la fianĉo?..

Maljuna Ĵpato estis surprizita kaj kortuŝita ĝis larmoj. Longe li staris, fikse rigardante jen la knabinon, jen la fianĉon, ne trovante konvenajn vortojn. Fine, lia maljuna griza kapo ekskuiĝis, la manoj ektremis kaj tra larmoj li diris:

— Pli konvenan fianĉon - bravulon estas neeble trovi por mia amata knabino, estu kun ili beno de Dio...

La edziĝofestenon oni decidis aranĝi post kelkaj tagoj. La fianĉo ĉiutage vizitadis la fianĉinon kaj šatis pasigi vesperojn en ĉeesto de Ĵpato. La knabino ne silentiĝante gaje babilis, rememorante, kiel ion parencan, nedisigeblan de šia ekzistaĵo mem, sian iaman vivon en la patrujo la hudo, renkontadon de pasaĝervagonaro, enigmoplenan bruadon de la arbaro, starinta je ambaŭ flankoj de la relvojo kaj senĉesan vibrantan zumadon de telegrafpadenoj. Kaj aŭskultante ŝin, Ĵpato milde ridetis, jese balancante per la kapo, — ja la rememoroj estis ankaŭ tiel proksimaj kaj karaj al lia koro! Ofte, laŭ deziro de la fianĉoj, dum tutaj horoj Ĵpato kun sinforgesiĝo rakontis al ili siajn impresojn de la pilgrimado, jen simple, tamen alt-poetike priskribante belecon de fremda naturo, jen nezimarkeble enigante en iliajn junajn resonemajn korojn siajn sanktajn travivaĵoj dum vizitado de neforgeseblaj sanktaj lokoj. La gejunuloj aŭskultis silente kaj nur multesignife interšangiĝis okulsignojn, kiam la inspirplena parolo de la maljunulo atingis entuziasmon.

La edziĝofestenon ĉeestis multaj ordenitaj altrangulo, lukse-ornamitaj kaj riĉevestitaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj; granda salono en la domo de la generalo estis plen-plena da gastoj. Kaj meze de orbroditaj uniformoj de sinjoroj, de luksaj kostumoj de sinjorinoj agrable eliĝis modesta figuro de la grizhara pilgrimanto en nova, ĵus kudrita longa vestaĵo. Ĉiuj, sciante jam la pasintaĵon de la maljunulo kaj lian pro-

asim

K

la pl

K

gast

kalo

detc

simian rilaton al la soleno, respektoplene salutis lin, kie ajn li aperus.

Kiam la gastoj sidiĝis al la tablo, plene meritite al la maljunulo estis lasita la plej honora loko - apud la beluline-fianĉino.

Kiam oni toastis „la maljunan vartiston kaj edukiston de la fianĉino", kiam ĉiuj gastoj brue kaj entuziasme leviĝis de siaj lokoj kaj de ĉiuj flankoj etendis al li siajn kalojn, maljuna Ĵpato, el ĉiuj fortoj peninta konservi serioze con kaj gravecon, ne povis deteni sin... Pro abundeco de sentoj, kiuj plenigis liam koron, li eksplodis, kiel infano.

I. Ŝizjaev

BUCHBINDEREI
FELIX PROUZA
NCHF. PETER GRÜNAUER
1090 WIEN, BERGG. 4/1A
TEL. 34 67 132